

EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 4





*Tropika Botanika Ĝardeno de
Xishuangbanna*

La botanika ĝardeno




Sciencistoj de la instituto observas plantojn en tropika pluvarbaro.




Cai Xitao, fama botanikisto pri kies laboro raportis la artikolo "Vizito al Vegetaja Instituto" en n-ro 2 de nia gazeto.


Tenisa floro



etarda floro (*Pyrostegia ignea* Presl.)



Kokova floro (*Plumeria akutfolia* Ait.)



Amerika agavo



Orkideo



Molbranĉa flava cikado



Varifolia arbo (*Codiaeum variegatum*)



Majtenoj uzeblaj
por kuraci kance-
ron



Antocetaloj (*An-
thocethalus*), kiuj
kreskas rapide kaj
liveras bonkvali-
tan lignon, estas
suksese enkondu-
kitaj el tropika
arbaro.



Budhoventraj bambuoj



Strangola planto




Hedemu



Olemelono

Li Zhengli (la dua de dekstre), biologia profesoro de Beijing-Universitato kaj sciencistoj de la Yunnan-a Instituto de Tropikaj Vegetaĵoj, kune studas pri enkonduko de drakarbo.





Gigantaj tabulformaj radikoj

Teknika renovigisto Huang

Huang Longxing estas veterana laboristo de maŝinfabriko de la urbo Hefei, Anhui-provinco. De multaj jaroj, li diligente lernis teknikojn, energie faris teknikajn renovigojn kaj faris relative grandan kontribuon por altigi la laborproduktivon kaj la kvaliton de produktaĵoj. Plurfoje li estas elektita kiel labormodelo, elstara teknika renovigisto, avangarda teknika laboranto de la provinco kaj labormodelo en la maŝina industrio de la tuta lando.

En la pasinteco, la internaĵoj de elektro-magnetaj valvoj produktitaj de tiu fabriko estis neprecize laŭnormaj kaj ne provis bone funkcii. Por solvi tiun problemon, Huang Longxing kaj kelkaj kamaradoj decidis fari provojn. Pro tio, ke la problemoj estis malfacilaj kaj komplikaj kalkulado devis esti farita, iliaj unuaj provoj malsukcesis. Huang Longxing tamen ne malkuraĝiĝis pro tio. Li kaj liaj kolegoj kune daŭrigis sian klopodadon, legis referencan literaturon, kaj fine elfaris renovigitan instrumenton, dank' al kies apliko ili solvis la problemon kaj ricevis laŭdojn.


En la lastaj jaroj, Huang Longxing partoprenis en projektado de tri specialaj ilmaŝinoj kaj renovigis 349 instrumentojn, dank' al kiuj la laborproduktivado estis altigita 4-10-oble.



Kamarado Huang
Longxing en laboro



Prova funkciigo de ilmaŝino



Kolektado de opinioj



La teknika renoviga grupo projektas novan instrumenton.



Renovigitaj instrumentoj



Lernigado

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1979
N-ro 4
(247)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Sur la Kovrilo:

P. 1 Gefratoj Plugas

(Novjara pentraĵo de NA
QIMING kaj ZHANG
HUANG)


P. 4 Nokto

(Lignoskulptaĵo de YANG
ZHIYIN)



Enhavo

Pri la konstruado de fervojoj de Ĉinio.	2
Sur la Yingtian-Xiamen-a Fervojo.	8
Nova epoko de la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono komen- ciĝis	14
Transformiĝo de ŝlima marbordo en fekundajn kampojn	19
Vizito al Xiashitang-brigado.	22
ESP-NOVAĴOJ	26
Si Xia kaj ŝiaj lernantoj.	27
Inspiro de legendo pri orelingoj.	29
La han-lingva fonetika alfabeto uzata en transskribo de ĉinaj propraj nomoj.	31
Klarigo pri la nova sistemo uzata por transskribo de ĉinaj propraj nomoj.	32
Verda Majo en Ĉinio (Daŭrigo).	33
Juanjuan kaj ŝia filino.	37
La loko de amo en la vivo.	39
AMIKECO: S. O. S. sur Mediteraneo.	43
TRA ĈINIO: Emei-monto.	44
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Vi- zito al la regiono de ĝuangoj.	46
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Ŝtona kaverno de Longmen	50
KURANTAJ AFEROJ.	52



Pri la Konstruado de Fervojoj de Ĉinio

La Ĉina Popola Respubliko baldaŭ festos la 30-an datrevenon de sia naskiĝtago. Kiel nun statas ĝia fervoja konstruado? Antaŭ nelonge iuj el niaj legantoj elmetis tiun demandon kaj esperas, ke ni faru relative detalan raporton pri tio. Tial ni sendis speciale raportiston por intervjui respondeculon de la koncerna departemento de la Fervoja Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko. Ĉisube estas liaj respondoj pri la pasinteco kaj hodiaŭo de la ĉinaj fervojoj kaj pri nia plano de moderna konstruado.

La Red.

Demando: Niaj legantoj deziras informiĝi pri la konstruado de fervojoj de Ĉinio. Mi intencas elmeti kelkajn demandojn kaj peti vin iom paroli pri ili, ĉu bone?

Respondo: Antaŭ ĉio bonvolu transdoni mian dankon al la eksterlandaj amikoj, pro ilia prizorgo pri la fervoja konstruado de Ĉinio.

Demando: Estas videble, ke en la nova ekonomia konstruado de Ĉinio, la fervoja konstruado ricevis grandan atenton. Bonvolu paroli pri la loko okupata de la fervojoj en la tuta konstruado.

Respondo: Ni ĉiam rigardas la fervojn kiel pioniron en la disvolvado de la nacia ekonomio. Ĉinio estas vasta lando, kies areo preskaŭ egalas al tiu de la tuta Eŭropo. Multaj naturaj riĉfontoj dislokiĝas en ĉiuj partoj de la tuta lando. Por ekspluati tiujn riĉfontojn kaj fari socialisman konstruadon, ni bezonas tre grandan transportan forton. Kompreneble, ni povas plene utiligi niajn akvovojojn, ĉar ni havas multajn riverojn kaj relative longan marbordon, kaj ankaŭ utiligi aerajn transportilojn, sed pro la vasteco de nia lando, trajnoj estas nun la ĉefaj transportiloj por ni. Pli ol 80% de la transpor-

titaj aĵoj de la fervojoj estas industriaj materialoj, precipe karbo, fero, ŝtalo kaj metalurgiaj materialoj, tial la fervojoj estas aortoj de la nacia ekonomio. Por konstrui nian landon en socialisman potencon kun modernaj agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj teknikoj, ni bezonas potencon modernan reton de fervojoj.

Demando: Bonvolu diri al mi, kian progreson la Popola Respubliko atingis en fervoja konstruado post sia fondiĝo.

Respondo: Antaŭ ol paroli pri tiu demando, unue ni rerigardu pri la fervojoj de la malnova Ĉinio.

Kiel konate, dum la lasta centjara periodo antaŭ la Liberiĝo, Ĉinio estis duonfeŭda kaj duonkolonia socio sub tiranado de fremdaj landoj. Tiam ĝia fervoja trafiko estis tre postĝinta. Ekzistis en la tuta lando iom pli ol 21,000 kilometroj da fervojo, sed antaŭvespere de la Liberiĝo funkciis nur pli ol 11,000 kilometroj. Tiam la kvalito de la fervojoj estis malbona, iliaj ekipaĵoj estis malmodernaj, la normoj estis neunuecaj kaj tre postĝintaj estis la sistemoj de administrado kaj direktado kaj la ekipaĵoj de komunikado kaj signalado. Aparte rimarkinde estas, ke plejparto de la efektivaj rajtoj de tiuj fervojoj estis en la manoj de imperiistoj kaj uzataj kiel iliaj instrumentoj por prirabi Ĉinion kaj plivastigi iliajn influferojn.

Post la naskiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ĉiuj fervojoj metiĝis sub la administradon de la ŝtato. En la pasintaj 30 jaroj, dek kelkaj novaj trunkaj fervojlinioj estis konstruitaj unu post

alia en la nordokcidenta kaj sudokcidenta partoj de nia lando. Je la fino de 1978, la longeco de la funkciaj fervojoj jam atingis ĉ. 50,000 kilometrojn. Sur iuj linioj konstruiĝis meĥanizitaj kaj duonaŭtomataj vagonklasifikaj ĝiboj, iuj linioj kaj signalaj sistemoj estis reformitaj, la transporta kapablo estis altigita kaj la cirkulado de vagonoj estis rapidigita. En 1950, la totala nombro de pasaĝeroj estis pli ol 150 milionoj dum tiu de 1978 atingis 800 milionojn, kaj la transportitaj varoj de 1950 estis nur ĉ. 100 milionoj da tunoj dum tiu de 1978 atingis 1,070 milionojn da tunoj. Ankaŭ la fervoja industrio de Ĉinio disvolviĝas paŝon post paŝo. Unuvorte, la sukceso atingita en la 30 jaroj estas rimarkinda, tamen Ĉinio ankoraŭ devas iri longan vojon por atingi la nivelon de la avangardaj landoj en fervoja transportado. Ni devas modeste lerni iliajn spertojn, enporti progresintajn teknikojn, por ke niaj fervojoj pli bone servu al la efektivigo de la kvar modernigoj de nia lando.

Demando: Vi ĵus diris, ke la novaj trunkaj fervojoj plejparte lokiĝas en la sudokcidenta kaj nordokcidenta partoj de Ĉinio. Kial oni tiel aranĝis la aferon? Kiel estas la ĝenerala dislokiĝo de la fervojoj en la tuta Ĉinio?

Respondo: Tia aranĝo estas farita laŭ la specifa stato de la fervojoj de nia lando. Ĉi tie mi iom parolu pri la dislokiĝo de la fervojoj en la malnova Ĉinio. Mi jam diris supre, ke antaŭ la Liberiĝo, la ĉinaj fervojoj plejparte estis en la manoj de imperiistoj, kaj tiuj fervojoj estis konstruitaj laŭ iliaj propraj interesoj.

Elektronika traka pesilo por vagono en movado, farita de la Wuhan-a Pesila Fabriko



La Qinghai-Tibeta Fervojo en konstruado



Tial, la dislokiĝo de tiuj fervojoj estis neracia, nome 60% de ili situis en la marbordaj provincoj, dum en la nordokcidenta kaj sudokcidenta regionoj, kie abundis produktaĵoj kaj naturaj riĉfontoj kaj vivis dekoj da nacimalplimulto, preskaŭ estis neniu fervojo.

Sekve de la grandskala ekonomia konstruado komencita post la Liberiĝo kaj la apero de novaj industriaj bazlokoj, ni konstruis unu post alia 6 trunkajn fervojojn en la provincoj Yunnan (Junnan), Guizhou (Gujōu) kaj Sichuan (Siĉuan), kiuj formiĝis unuapaŝe en ringan framon de fervoja reto, radikale ŝanĝis la trafikan malfacilan staton en la Sudokcidento kaj interligiĝis kun la aliaj partoj de la lando. La fervoja konstruado en nordokcidenta Ĉinio

komenciĝis en la unua jaro post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Nun, kvar trunkaj linioj kun Lanzhou (Lanĝou) kiel la centro formiĝis en framon de fervoja reto en la Nordokcidento. La ŝtreĉe konstruata fervojo en suda Xinjiang (Hingiang) kaj la Qinghai (Kinghaj)-Tibeta Fervojo ludos gravan rolon en disvolvado de niaj industrio de petrolo, natura gaso, neferaj metaloj kaj kemiaj materialoj, plifortigo de la landlima gardado kaj la unuiĝo de la naciecoj. Krome, ankaŭ en la nordorienta, norda, orienta kaj sudorienta marborda regionoj de Ĉinio konstruiĝis novaj fervojoj. La trunkaj fervojaj linioj Beijing-Shanghai-a (Pekin-Ŝanhaja) kaj Beijing-Guangzhou-a (Pekin-Kantona) estis dutrakigitaj, kaj ambaŭflanke de ili konstruiĝis

pluraj branĉaj linioj. Paralele kun la Beijing-Guangzhou-a linio konstruiĝis la Taiyuan (Taj-juan)-Jiaozuo-a, Jiaozuo-Zhicheng-a kaj Zhicheng-Liuzhou-a Fervojoj, kiuj ludos gravan rolon en la industria produktado kaj la konstruado de la montregionoj en centra-suda Ĉinio.

Nia lando ankaŭ konstruis specialajn fervojojn por grandaj fabrikoj, minejoj, maraj havenoj kaj forstokulturejoj. Ekzemple, en la montaroj Changbai (Ĉangbaj) kaj la Granda kaj Malgranda Xing'an (Hing-an) en la Nordoriento konstruiĝis specialaj fervojoj, dank' al kiuj tiea ligno povas esti elportita al diversaj lokoj de la lando. Henan-provinco en centra Ĉinio prezentas alian ekzemplon: en la pasintaj dekkelkaj jaroj konstruiĝis tie pli ol mil kilometroj da lokaj fervojoj interligantaj pli ol 30 guberniojn, kaj ili fariĝis parto de la tutlanda fervoja reto.


En la nuna tempo, ĉiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj, escepte de Tibeto, jam havas fervojojn, kaj la neracia dislokiĝo de fervojoj jam estas unuapaŝe ŝanĝita.

Demando: Ĉu vi povus iom paroli pri la konstruado kaj rimarkindaj faroj de la konstruantoj de tiuj fervojoj?

Respondo: Por la konstruado de tiuj fervojoj nia lando uzis grandan forton. Precipe la linioj en la sudokcidenta kaj nordokcidenta regionoj devis plejparte transpasi altajn montojn, grandajn riverojn, trapasi dezertojn, arbarojn, marĉejojn, sablejojn, lokojn kun ŝlimŝtona fluo aŭ frostiĝinta tero kaj tertremajn zonojn, kaj pro tio la konstruado estis tre malfacila kaj komplika. Ekzemple, la Baoji-Chengdu-a Fervojo transpasanta la montaron Qinling (Kinling), konstruita en la komenca periodo post la Liberiĝo, havas sur sia 669-kilometra linio 303 tunelojn kun totala longeco de pli ol 84,000 metroj, 994 pontojn kun totala longeco de pli ol 26,800 metroj. Ĝi estas konstruita en 5.5 jaroj. La Chengdu-Kunming-a Fervojo, trunka linio en sudokcidenta Ĉinio, havas 427 tunelojn kaj 653 pontojn. Ĝia Shamulada-tunelo longas 6 kilometrojn, kaj dum la konstruado 12,000 tunoj da akvo ŝprucis el la tunelo dum unu tagnokto. La konstruado de la Xiangfan-Chongqing-a Fervojo estis pli malfacila.

La konstruado hardis kaj elkulturis multajn teknikistojn. Inter ili troviĝas diplomitaj studentoj de fervojaj institutoj kaj laboristoj. Por rapide fari konstruadon de fervojoj, ni ankoraŭ devos kulturi teknikistojn per diversaj manieroj,

Trajno sur la Qinghai-Tibeta Fervojo trapasas Chaidamu-basenon.



kiel ekzemple kulturaj esplorajn studentojn, sendi studentojn al fremdaj landoj kaj senĉese altigi klerecon de la laboristoj.

Demando: Ĉu vi povas iom paroli pri la fervojaj pontoj?

Respondo: Ĉinio kun vasta teritorio kaj multaj riveroj estas lando de multego da pontoj kaj havas longan historion de ponto-konstruado. Sed la konstruado de fervojaj pontoj komenciĝis nur kun la konstruo de fervojoj fare de fremduloj en Ĉinio. En la pasinteco, la relative grandaj fervojaj pontoj, kiel la Zhengzhou-a (Ĝengĝou-a) Pontego kaj la Jinan-a (Ginan-a) Pontego super la rivero Huanghe (Flava Rivero), ĉiuj estis konstruitaj de fremduloj. Kaj super la plej granda rivero de Ĉinio Changjiang (Jangzi-rivero) estis neniuj ponto.

Post la naskiĝo de la nova Ĉinio, unuflanke ni rekonstruis kaj reformis la malnovajn fervojajn pontojn, aliflanke ni konstruis multajn fervojajn pontojn super la riveroj kaj valoj sur la nove konstruitaj linioj. Ekzemple, la Baoji-Chengdu-a Fervojo havas 1.5 pontojn meznombro por ĉiu 1-kilometra parto. La Chengdu-Kunming-a Fervojo devas transpasi la Grandan kaj Malgrandan Liangshan-montarojn kaj la riverojn Jinsha kaj Dadu, kaj meznombro ĉiu 1.7-metra parto havas unu grandan aŭ mezgrandan ponton. En la pasintaj 30 jaroj, ni konstruis 4 pontegojn super Changjiang-rivero ĉe Chongking, Yidu, Wuhan (Vuhan) kaj Nanjing (Nankino) kaj pli ol dek fervojajn pontojn

super la rivero Huanghe. Hodiaŭ, super plejparto de la grandaj riveroj de nia lando jam troviĝas modernaj fervojaj pontoj konstruitaj de ni mem.

Kompreneble, en la konstruado de fervojoj ankaŭ la fervoja industrio devas esti konforme disvolvita.


Demando: Kiel iras la fervoja industrio?

Respondo: Estas rimarkinde, ke nia lokomotiva industrio estas fondita nur post la naskiĝo de la Popola Respubliko. La dekelkaj fervojaj fabrikoj en la malnova Ĉinio ĉiuj estis riparejoj. Ĉiuj lokomotivoj tiam uzataj estis fremdlandaj fabrikoj. Tiam estis pli ol cent specoj de lokomotivoj kaj pli ol 700 specoj de vagonoj por pasaĝeroj kaj varoj.

En 1952, la nova Ĉinio produktis sian unuan memfaritan vaporan lokomotivon; en 1958, ĝi projektis kaj fabrikis dizelan kaj elektran lokomotivon. En la lastaj jaroj, ĝi produktis dizelajn kaj elektrajn lokomotivojn kun relative grandaj povoj. Hodiaŭ, ĝi jam povas produkti, krom ordinaraĵoj pasaĝeraj kaj varaj vagonoj, ankaŭ multajn specojn de specialaj vagonoj.

Ankaŭ la produktokvanto de lokomotivoj de nia lando kreskadas. La nombro de lokomotivoj en 1978 kreskis pli ol kvaroble kompare kun tiu de 1965, tiu de pasaĝeraj vagonoj kvinoble kaj tiu de varaj vagonoj sesoble. Oni povas diri, ke en nia lando jam fundamente formiĝis relative kompleta sistemo por fabrikado kaj

Ponto de la Sud-Xinjiang-a Fervojo en konstruado



riparado de lokomotivoj kaj vagonoj. Kompreneble, por kontentigi la bezonon de enlanda transportado, ni ankoraŭ devas plue altigi la industrian povon de fabrikado kaj riparado de lokomotivoj kaj vagonoj.

Demando: La situacio de la ĉina fervoja transportado ĉiam estas sub zorgado de amasoj. Ĉu vi povas diri al mi vian opinion pri tiu afero?

Respondo: La fervoja transportado estis serioze ĝenita kaj subfosita de la "kvarpersona bando" kaj estas nomata "serioze plagita sfero". Ni prenu la Fervojan Buroon de Zhengzhou (Ĝengĝou) kiel ekzemplon. Ĝi estas pivoto de tri trunkaj fervojoj de nia lando. Antaŭ la jaro 1977, la produktaj normoj de tiu fervoja administracio grandskale malaltiĝis, foje ĝi ne povis plenumi sian taskon dum sinsekvaj 19 monatoj kaj la trunkaj linioj ofte estis obstrukcataj. Post la frakaso de la "kvarpersona bando", la situacio de tiu administracio evidente pliboniĝis kaj la fervojaj linioj ĉiam bone funkcias. En la pasinta jaro, la fervojoj de la tuta lando plenumis la vartransportan taskon je 33 tagoj antaŭdate kaj transportis 147,000,000 tunojn da varoj pli multe ol tiu en 1977. La transportado de ĉefaj materialoj estis garantiataj. La ĉefaj ekonomiaj kaj teknikaj normoj de la tutlanda fervoja transportado plejparte atingis aŭ superis la plej bonan nivelon en la historio.

Pro la malalta nivelo de niaj administrado kaj teknikoj, la rapideco de fervoja konstruado ankoraŭ ne konformas al la ekonomia disvolviĝo de la tuta lando kaj ni estas klopodantaj por solvi tiun problemon.

Demando: Kiuj novaj postuloj estas elmetitaj al la fervoja ministerio por efektiviĝi la kvar modernigojn en Ĉinio?

Respondo: En la venontaj 22 jaroj, la nacia ekonomio de nia lando havos relative rapidan disvolviĝon. En la venonta periodo ĝis 1985, nia lando nove aŭ plue konstruos 120 grandajn objektojn inkluzive de 10 fer-ŝtalaj bazoj, 9 neferaj metalaj bazoj, 8 karbaj bazoj, 10 grandaj olekampoj, 30 grandaj elektrejoj, 6 novaj trunkaj fervojaj linioj kaj 5 gravaj havenoj. En tiu konstruado, la fervojoj havas tre pezan taskon.

En la venonta periodo, ni metos nian atenton ĉefe al la konstruado de 6 novaj trunkaj linioj kun longeco de ĉ. dekmil km. kaj reformado de 9 malnovaj linioj. Ambaŭflanke de tiuj trunkaj linioj, troviĝas riĉfontoj de petrolo, fero, karbo, neferaj metaloj kaj forsto, krome ili povas plifortigi la interligon de la internaj kaj marbordaj lokoj, akceli la disvolviĝon de la industria bazoj kaj ankaŭ utili al la nacidefenda konstruado.


Demando: Ĉinio rigardas la 8 jarojn post 1978 kiel gravan konstruan periodon. Ĉu vi povas diri al mi, kiajn paŝojn la fervojaj departementoj faros en tiu periodo por efektiviĝi modernigon de la fervojoj?

Respondo: La fundamentaj postuloj por modernigi la fervojojn en la periodo estas altigi la tirpovon de la lokomotivoj, grandigi la rapidecon de la vagonaroj kaj pliigi la trajnojn veturantajn sur la linioj por kiel eble plej multe transporti.

Hodiaŭ, la ekipaĵoj de la fervojoj de nia lando ĝenerale restas sur la nivelo de la kvardekaj jaroj. Por modernigi la fervojojn, antaŭ ĉio, ni devas efektiviĝi ĝeneralan uzon de dizelaj kaj elektraj lokomotivoj, fabriki kaj importi modernajn pasaĝerajn vagonojn kaj grandajn varvagonojn, reformi la fervojajn liniojn por efektiviĝi rapidan veturadon de longaj, grandaj kaj pezaj trajnoj, altigi la nivelon de aŭtomateco de la fervojoj kaj fortigi sciencan administradon. Samtempe kun nia propra esplorado kaj fabrikado de modernaj ekipaĵoj, ni ankaŭ aĉetos fremdlandajn produktaĵojn, enkondukos eksterlandajn avangardajn teknikojn, lernos progresintajn administrajn metodojn kaj kulturos kapablajn laborantojn. Post plenumo de la diritaj paŝoj, la trunkaj linioj kun streĉa transportado efektiviĝos la unuajn fundamentajn postulojn de modernigo. Kaj la transportaj ekipaĵoj kiel lokomotivoj, vagonoj, pontoj, tuneloj kaj signaliloj estos teknike reformitaj laŭ tiuj postuloj.

Ekde tiu ĉi jaro, Ĉinio sin dediĉos al la socialisma moderniga konstruado. Retrorigardante la vojon iritan en la pasintaj 30 jaroj, la ĉina popolo estas plena je memfido pri sia estonteco.

Sur la Yingtán- Xiamen-a Fervojo




- | | |
|------------|--------------|
| 1. Yingtán | 4. Zhangzhou |
| 2. Shaowu | 5. Xiamen |
| 3. Sanming | |

VAGONARESTRO diris: “En nia nova rapida vagonaro n-ro 175 de Shanghai al Xiamen, troviĝas nemalmultaj ĉinaj elmigrintoj, venantaj por viziti parencojn kaj pitoreskejojn. Lastatempe, ni akceptis iun maljunulon, elmigrantan al la Filipinoj. Antaŭ 40 jaroj, por serĉi vivrimedon, li forlasis sian naskiĝlokon. Tiutempe, en la malriĉa Fujian-provinco (Fugian) troviĝis neniu fervojo. Veturinte tri tagojn boate kaj aŭte, li fine sukcesis kapti trajnon al Shanghai (Ŝanhajo). Post la Liberiĝo de la patrolando, li informiĝis en Manilo, ke en lia naskiĝloko jam konstruiĝis la Yingtán-Xiamen-a Fervojo preskaŭ 700-kilometra, liganta la izolitajn forstejojn kaj minejojn kun aliaj provincoj. Tio ege lin ĝojigis. Multaj elmigrintoj aĉetis, por siaj konatoj, bombonojn kun speciala marko ‘Ying-Xia’, por celebri la ekfunkcion de la fervojo. Mem veturante en la rapida vagonaro por viziti parencojn, la maljunulo emocie diris: ‘La vagonaro n-ro 175 ja estas printempa hirundo de la patrolando!’”

YINGTAN — NOVA PIVOT-STACIO

La vagonarestro ĝojplene parolis al mi pri la ŝanĝiĝo de urboj kaj kamparo ambaŭflanke de la fervojo. Fine li diris: “Unu vido pli taŭgas, ol dek aŭdoj. Faru vojaĝon per nia vagonaro por vidi propraokule.”


La direktejo de la ĝiba vagonkuplejo



Sekve mi komencis vojaĝon de la urbeto Yingtan al la sudo.


Yingtan situas en la orienta parto de Jiangxi-provinco (Gianghi), antaŭe tie estis pramejo de iu rivero. Oni diras, ke ĉe abrupta turniĝo de la rivero troviĝis profundejo, super kiu falkoj are flugadis, tial tiu loko ricevis la nomon Yingtan (Falk-profundaĵo).


Ekde la granda antaŭensalto en 1958, la Yingtan-Xiamen-a Fervojo aperis sur la tero de sud-orienta Ĉinio, kaj Yingtan fariĝis grava trafika pivoto de la tri provincoj Fujian, Zhejiang (Ĝe-giang) kaj Jiangxi. En la stacio troviĝas 44 trakoj kaj progresintaj instalaĵoj de relajsa interkroĉiĝa signalsistemo por linioj en ĉefa stacio. En 1976, oni kuplis kaj malkuplis ĉiutage 2,300 vagonojn kaj nun jam 3,500. Gvidate de maljuna Xiang, inĝeniero de la stacio, ni ascendis sur la direktan platformon de la ĝiba vagonkuplejo, de kiu oni povas vidi, ke vagonoj malkupliĝas sur multforkaj trakoj, kaj fore vagonoj kun koloraj anasoj de Fujian pretiĝas ekiri.



Parto de la arbara regiono Longhu

La Fujian-a Vinilona Fabriko





Aoyuan-parko en mateno (Monumento pri la Liberigo de Jimei)

Ĉiumonate, la pasaĝeroj veturas suden kaj norden je cent kvardek mil homfojoj. 40% el la pasaĝeroj, kiuj ŝanĝas trajnon en tiu loko, estas elmigrintaj ĉinoj. Tial en la stacidomo troviĝas apartaj atendejo kaj fako por mendi kupeon por elmigrintaj ĉinoj. La administrado de la stacio estas tre efika. En la lastaj jaroj, ĝi ĝuas tre altan prestiĝon pro ĝustatempeco de veturado inter la gravaj stacioj de la tuta lando. Pasintjare, la ŝtato asignis al ĝiaj laborantoj dek mil juanojn kiel premion pro ilia eminenta laboro.

Kun la disvolvo de produktado, la oficistoj kaj laboristoj de Yingtian sinsekve transloĝiĝis en pli ol cent novajn domojn. Ni promenis sur la pura aleo. Se la gastigantoj ne dirus al ni, ni tute ne povus imagi al ni ke pasintecce tie estis loko de kadukaj kabanjoj.


TRA ALTAJ MONTOJ KAJ DENSAJ PRAARBAROJ

La rapida vagonaro n-ro 175 ekveturis de Yingtian en la montregionon de orienta Jiangxi kaj antaŭen kuris ĉirkaŭante montojn. Ekstere vidiĝis sudĉiniaj montvilaĝoj. Palmoj ombras vilaĝajn domojn kun ruĝtegora tegmento kaj

ŝtonmuroj. Elektristo de Hidroelektrejo de la komunumo riparas elektro-fadenon sur stango. Subite profunda tunelo brakumis la vagonaron. Dum la tuta vojo ni trapasis sume 46 tunelojn grandajn kaj malgrandajn. La vagonaro daŭre antaŭen kuras, kaj pro la arda suno de suda Ĉinio, ni, pasaĝeroj venintaj el Beijing devis demeti la dikajn mantelojn kaj lanvestojn. . .

La vagonaro preterpasis kelkajn malgrandajn staciojn kaj atingis Tieniuguan — la trafikan gorĝon inter la provincoj Fujian kaj Jiangxi. Tiu pasejo deantikve estis ŝlosila punkto por militistoj. Antaŭ unu jarcento, pli ol 300,000 insurgentoj de la Ĉiel-paca Regno tie frakasis la garnizonantan trupon de Qing-dinastio (King) kaj rekte eniris en Fujian. Antaŭ pli ol 40 jaroj, la Ĉina Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo kelkfoje batalgajnis ĝin kaj kreis la revolucion bazlokon de norda Fujian.

La vagonaro trapasis Dahuoshan-tunelon de Wuyi-montaro, longan je 1,500 metroj kaj eniris en Shaowu-gubernion, kiu estas grava arbarobazloko de Fujian-provinco. Tie 90% de la tero estas altmonta arbaro. Post la malfermiĝo de la Yingtian-Xiamen-a Fervojo al trafiko, tre rapide disvolviĝis la arbara produktado de la gubernio.



Jimei-mezlernejo

La jara produktokvanto de ligno atingis 160,000 kubmetrojn, t.e. naŭ-oblo de tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. De la stacio ĝis la lignotenejo de Shaowu-gubernio konstruiĝis du specialaj fervojoj, per kiuj oni ĉiujare kolektas kaj transportas ĉ. 230,000 kubmetrojn da lignoj el Jianning, Taining kaj aliaj proksimaj gubernioj. Interalie, troviĝas ligno de ormosio (*Ormosia Henryi*) kun koloraj strioj, taŭga por farado de altklasaj mebloj kaj gravurado, pin-ligno taŭga por ponto-trabo, nanmu-ligno de Fujian kaj rara sasafra-ligno. Pasintece, pro malfacila trafiko, multe da ligno estis forjetita kaj nun ĉiutage dudek vagonoj da ligno estas fortransportita el la lignotenejo. Lastjare, la ŝtato produktis tie 3,400 kubmetrojn da tavoloj kaj 4,300 tunojn da fibro-tabuloj. Konstruado de laborejo kun aŭtomata produkta linio por produkti lignajn kestojn de koloraj televidiloj estas en preparo.

Ni veturis laŭ la ŝoseo serpentanta ĉirkaŭ montoj al Longhu-a arbohakejo. Inter piceoj kaj pinoj nubskrapantaj intense iras transportado per vinĉoj kaj kabloj en aero. Laŭ takso, la tuta arbaro sufiĉas por hakado dum tridek jaroj, tio signifas, ke la nove plantitaj arboj povas kres-

kadi 30 jarojn antaŭ forhako. En ĉiuj arbohakejoj, troviĝas pork-staloj, kok-staloj, legomĝardenoj kaj fiŝlagetoj bone mastrumataj de familianoj de oficistoj kaj laboristoj. La abunda provizado de kunmanĝaĵoj faris profundan impreson al la vizitantoj.

En la gubernia urbo, mi vizitis speciale magazenojn, kies varoj jam plimultiĝis de 200 specoj antaŭ la ekfunkcio de la fervojo ĝis pli ol 3,000 specoj nun. Pasintjare, la vendkvanto de brakhorloĝoj, steb-maŝinoj, lanfadenoj kreskis 10-20-oble kompare kun tiu de la jaro 1967. Oni diras ke pasintece, kamparanoj vizitis urbon nur por aĉeti iom da blua ŝtofo, sed nun ili kutimas akiri por si poliesterajn vestojn produktitajn en Shanghai, vinon kaj ŝinkon produktitajn aliloke. Nun inter Shaowu, kiun trapasas trajno, kaj aliaj naŭ proksimaj guberniaj urboj jam formiĝis transporta reto akva kaj tera. Miloj kaj miloj da tunoj da greno, ligno kaj teo estas senĉese transportataj per trajnoj al aliaj lokoj. Interalie, la pertrajna transporta kosto de ĉiu tuno da teo estas malpli alta je 50 ĝis 80 juanoj ol tiu per aŭto.

NOVA INDUSTRIA URBO

Forlasinte la forstoregionon de norda Fujian, la vagonaro kuras al la nova industria urbo Sanming. Post la ekfunkcio de la Yingtang-Xiamen-a Fervojo, tiu depresia urbeto jam ŝanĝiĝis al nove disvolviĝanta industria regiono, kies totala industria produktovaloro okupas la duan lokon en la tuta Fujian-provinco. Tie konstruiĝis pli ol 140 fabrikoj, kiuj ĉiujare produktas pli ol 1,300 specojn da produktaĵoj, inkluzive de fero, ŝtalo, maŝinoj kaj elektronikaj aparatoj. Nun ĝi jam fariĝis grava industria bazo de Fujian-provinco. En la urbo, konstruiĝis domegoj kaj kvar pontoj super la bela Shaxi-rivero.

Ni vizitis la Feran-ŝtalan Fabrikon de Sanming, longan je 5 kilometroj. Ĝi havas striktan rilaton kun la Yingtang-Xiamen-a Fervojo. En la komenco de la konstruado en 1958, multaj maŝinoj de la fabriko estis alportitaj per la fervojo. Tiu ŝtala fabriko, kiu produktas ŝtalon ĉefe per konvertoroj kun desupra oksigenblovo, nun jam povas laminati pli ol 270 specojn de ŝtaloj. La laboristoj laminatis bonegajn U-ŝtalojn kaj pre-

zantis ilin al la konstruejo de la Memora Halo de Prezidanto Mao (Maŭ).

Estas atentinde, ke en tiu ĉi regiono troviĝas Qingzhou-paperefabriko, kies produktado estas direktata per komputeroj kaj televidiloj. La sekretario de la partia komitato de la fabriko estas teknologia inĝeniero, kiu bone scias teknikojn kaj estas varme subtenata de la amasoj. En tiu fabriko, aŭtomata civiliza produktado estas praktikata en la tuta procedaro kaj la jara produktokvanto de veneno atingis 55,000 tunojn.

Poste, ni vizitis ankaŭ la aŭtomatan Vinilonan Fabrikon de Fujian. Ĝia ekipaĵo estas projektita, farita kaj instalita de ĉinaj teknikistoj kaj laboristoj, reference laŭ importitaj progresintaj instalaĵoj. En unu el ĝiaj laborejoj, ni vidis pakadon kaj pesadon de neĝblankaj vinilonaj fibroj. Tiu fabriko pasintjare donis al la ŝtato profiton de dek unu milionoj da juanoj. Tiu sumo egalas 10% de la tuta investaĵo de la ŝtato al la fabriko.

Ni venis al Xubi-vilaĝo de Sanming-urbo. Antaŭe tie estis koncentrejo de Guomintanga reakciularo por malliberigi kaj murdi revoluciojn. Nun, sur la tero, kie niaj martiroj verŝis sangon, jam stariĝis fabrikoj, lernejoj, magazenoj kaj loĝdomoj. Dum siatempa inspektado, Prezidanto Zhu De (Ĝu De) per jena poemo montris la ŝanĝiĝon de Sanming-regiono:

*En verda mont' ripozas la martiroj,
Funebras akvo pri l' fidela kor';
La masakrej' fariĝis jam alio —
Jen industria urbo en labor'.*


LANDO DE FLOROJ KAJ FRUKTOJ

En longa fajfado de la vagonaro, antaŭ ni aperis Zhangzhou, fama urbo konata kiel "lando de floroj kaj fruktoj". Antaŭ la Liberiĝo, Zhangzhou estis konsumata urbo kaj multaj migris eksterlanden por trovi vivrimedojn. Post ekfunkcio de la Yingtan-Xiamen-a Fervojo, ĝi fariĝis industria urbo. La liĉi-brando kun fabrik-marko "Lanternparo" produktita en la urbo estas kristale klara, bongusta, aroma kaj nomata de eksterlandaj amikoj kiel "ĉina ĉampano". Ankaŭ medikamento "Pianzihuang", bona kuracilo por hepatito havas grandan debiton en Xianggang (Hongkongo), Aomen (Makao) kaj aliaj lokoj.

Ni eniris en manĝajan vendejon de Zhangzhou kaj vidis, ke sur la bretaro prezentiĝas diversaj malaltprezaj freŝaj fruktoj kaj kompotoj. Pasintjare, la kvanto de bananoj, mandarinoj, ananasoj, pampelmusoj, longanoj kaj aliaj, produktitaj en la antaŭurbo, atingis pli ol milionon da kilogramoj. Dum nia vizitado, abundis bananoj en la merkato. Komunumanoj de la antaŭurbo sin okupis pri transportado de bananoj al la fervoja stacio. Lokanoj diris: Antaŭ la Liberiĝo, pro malbona produktado kaj malfacila vendado de fruktoj iuj fruktarboj de tiu loko estis forbruligitaj. Poste, aperis ŝoseo, tamen transporta kosto estis je 20% pli alta ol tiu per trajno kaj krome pro difektiĝo en transportado, pliparto de la freŝaj fruktoj perdiĝis. Pro tio nun la fervojo alportis al tiu loko multajn utilojn.

Survoje ni jam vidis iujn eksportotajn ladmanĝaĵojn kun komercmarko "Narciso". Poste ni informiĝis, ke la narciso de Zhangzhou ĝuas altan prestiĝon eksterlande. La narciso floras en frosta vintro kaj estas milde aroma. Pasintjare, tie pli ol 750,000 narcisaj bulboj liveriĝis al la merkato kaj nemalmultaj el ili estis transportitaj al Sudorienta Azio, Eŭropo, Ameriko kaj aliaj lokoj.

La printempa Ludao-insulo



PLI GAJE FLUGU LA “PRINTEMPAJ HIRUNDOJ”



La gaja vagonaro trapasis la mardigon de Xiamen longan je 5 kilometroj, kiu estis konstruita siatempe el pli ol du milionoj da tunoj da granto. Marondoĵ ambaŭflanke de la digo frapas la bordoĵn kaj aro da mevoj flugis surprizite. Mi venis al la lasta stacio de nia vojaĝo.

Xiamen estas pitoreska urbo. La fervojo interligis ĝin kun la kontinento per la digo kaj la urbo fariĝis duoninsulo. Ĝia haveno estas profundakva. Ĉe ĝia kajo estas konstruata profunda ankrejo. Trajno povas rekte veturi al la haveno. Nun, la kvanto de varoj en- kaj elŝipigitaj en la haveno, duobliĝis kompare kun tiu antaŭ kvin jaroj. Pasintjare, eksportitaj komercaĵoj de nia lando kun valoro de pli ol 80,000,000 usonaj dolaroj estis transportitaj tra Xiamen al la internacia merkato. Interalie, blankaj orefungoj kun marko “Lujiang”, Wulong-teo, kaj diversaj ladmanĝaĵoj kun marko “Narciso” estas plej bonvenaj. Ekde la pasinta jaro, la vesto-fabrikoj de Xiamen prenis la taskon fari pogrande ĉemizojn por Xianggang.

Okcidente de Xiamen troviĝas “Surmara Parko” — Gulangyu. Ĝi estas pitoreskejo kun sanatorioj kaj elektronika industrio. Tie konstruiĝis fabrikoj de altfrekvencaj instalaĵoj, radioaparatoj kaj elektraj instrumentoj, kies jara produktvaloro atingis kelkajn milionojn da juanoj. En la malnova socio, Gulangyu estis okupita de koloniistoj kaj fariĝis “Universala Koncesio”. Mi vizitis la kazernon konstruitan siatempe de nia nacia heroo Zheng Chenggong. Antaŭ pli ol tri jarcentoj, Zheng Chenggong venkis nederlandajn agre-santojn kaj reprenis Taiwan (Tajvan) el iliaj manoj. Ne malproksime de la pordo de la kazer-no estas historia restaĵo de malnova teraso, sur kiu Zheng Chenggong direktis ekzercadon de mararmeo. Sur giganta ŝtono estis gravuritaj ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj “Heroo-stilo sur la maro de Fujian”. Siatempe, la bravaspekta Zheng Chenggong en kirasvesto kun glavo en mano ekzercis tie marsoldatojn. Nun Xiamen jam fariĝis haveno por ekstera komerco.

Finiĝis mia agrabla vojaĝo sur la Yingtian-Xiamen-a Fervojo. Ni deziras al la “printempaj hirundoj de la patrolando” ankoraŭ pli gajan kaj rapidan flugon en la nova longa marŝo.

Sunluma Roko de Gulangyu



Nova Epoko de la Rilatoj inter Ĉinio kaj Usono Komenciĝis

de NIA RAPORTISTO

KOMENCIĜIS nova epoko en la historio de la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono.

Je la 1-a de januaro ĉijare, stariĝis oficiala diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono. Je la 29-a sammonate, Deng Hiaoping (Deng Hiaŭping), vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, kaj lia edzino Zhuo Lin faris oficialan amikan viziton al Usono laŭ invito de la usona prezidanto Jimmy Carter kaj lia edzino. Tio estis la unuafoja vizito de ĉinaj gvidantoj al Usono de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La monda publiko ĝenerale opiniis, ke la starigo de diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono kaj la historia vizito de Vicĉefministro Deng ne nur havas grandan signifon por disvolvi amikan rilaton inter Ĉinio kaj Usono kaj profundigi la amikecon inter la popoloj de ambaŭ landoj, sed ankaŭ faros profundan influon en akcelo al la paco, sekuro kaj stabileco en Azio, en la Pacifika Regiono kaj eĉ en la mondo.

Dum sia vizitado al Usono, Vicĉefministro Deng ricevis solenan varman bonvenigon de ĝiaj registaro kaj popolo. Vicĉefministro Deng kaj Prezidanto Jimmy Carter faris sinceran, amikan, konstruivan kaj fruktodonan interparoladon pri problemoj, kiuj interesas la du landojn. Ambaŭ flankoj refreŝigis sian oponon kontraŭ ĉasado de hegemonio aŭ interveno de iu ajn lando aŭ aro de landoj al internaj aferoj de aliaj landoj kaj decidis fari kontribuon por protekti la internaciajn pacon kaj sekurecon kaj nacian sendependecon. La du flankoj opinias, ke kvankam malsamaj estas la sociaj sistemoj de la du landoj, tamen tio ne devas malhelpi plifortigon de la amikaj rilatoj kaj kunlaboroj de la du landoj. Ili decidis klopodi por tio kaj firme kredas, ke tia kunlaboro konformas al la interesoj de la du popoloj, kaj ankaŭ al la mon-

daj paco kaj stabileco, precipe al la paco kaj stabileco de Azio kaj la Pacifika Regiono.

La vizito de Vicĉefministro Deng al Usono vive montris, ke tre vastan perspektivon havas la disvolviĝo de amikeco kaj kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono. En la interparolado de gvidantoj de la du landoj, Prezidanto Jimmy Carter akceptis la inviton viziti Ĉinion kaj Vicĉefministro Deng en la nomo de Ĉefministro Hua Guofeng akceptis la inviton viziti Usonon. La du landoj subskribis interkonsenton pri scienca kaj teknologia kunlaboro, interkonsenton pri kulturo, kaj interkonsenton pri kunlaboro en la kampo de altenergia fiziko, interŝanĝis leterojn pri interkomprenoj pri kunlaboro inter la du landoj en eduko, agrikulturo kaj spaco, konsentis pri subskribo de interkonsentoj pri komerco, aviado, mara transportado kaj konsentis reciproke doni favorojn por interŝanĝo de konstantaj raportistoj. Sendube, la kunlaboro inter la registaroj de la du landoj kaj kontakto inter iliaj popoloj estos pli solidaj, pli konstruivaj kaj esperigaj.

Ĉinio kaj Usono estas du grandaj landoj en la mondo. La interrilato de ili estas longa kaj komplika. Pro historiaj kaŭzoj, en la lastaj kelkdek jaroj, la rilatoj de la du landoj estis plenaj de nenormalaĵoj. Sed, la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono ĉiam estis bona kaj firma eĉ en tempo, kiam la ĉina revolucio troviĝis en plej malfacilaj jaroj aŭ kiam akra antagonismo regis en la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono. La ĉina popolo ĉiam karmemoros la fame konatan verkiston kaj raportiston Edgar Snow, kiu faris, en sia vivo, grandan kontribuon por la revolucia afero de la ĉina popolo kaj la amikeco inter Ĉinio kaj Usono, ĉiam memoros liajn vortojn en lia lasta mallonga letero

Prezidanto Jimmy Carter kaj lia edzino Rosalynn Carter, Vicĉefministro Deng Xiaoping kaj lia edzino Zhuo Lin sur balkono de la akceptejo de la Blanka Domo salutas al amasoj per mansvingo.



al lia parenco antaŭ lia forpaso: “Mi amas Ĉinion, mi esperas ke post mia morto parto de mia cindro povos resti en ĝi . . .” Hodiaŭ, Edgar Snow kviete kuŝas ĉe la bordo de la lago Weiming en la Beijing-a Universitato en Ĉinio kaj li neniam apartiĝos de la ĉina popolo. La ĉina popolo ĉiam karmemoros ankaŭ Agnes Smedley, Anna Louise Strong k.a. sincerajn amikojn de la ĉina popolo, ĉiam sopiras al ĉiuj ĉinaj amikoj en Usono trans Pacifiko. Ilia sincera amikeco al la ĉina popolo senĉese skribas novan paĝon en la historio de amika rilato inter Ĉinio kaj Usono.

La usona popolo estas granda popolo. La usona “Deklaro pri Sendependeco” siatempe donis bonan influon al progresemaĵoj en la movado por renversi la imperiestran reĝimon. Subtenate de la usona popolo kaj patriotaj ĉinoj en Usono, Sinjoro Sun Zhongshan (Sun Jatsen), la granda ĉina demokratia pioniro organizis en Usono la revolucionan societeton Xing Zhong Hui (Hingĝonghuj). En la periodo de la fondiĝo de Usono, granda nombro da ĉinoj elmigris al okcidenta Usono, helpis la lokanojn en ekspluato de minajoj, konstruado de fervojo, kulturebligo de virga tero, konstruado de urboj kaj urbetoj kaj

faris kune kun la usona popolo grandan kontribuon en la konstruado de Usono. En komuna laboro ili profunde amikiĝis kun la usona laboranta popolo. La starigo de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono kaj la vizito de Vicĉefministro Deng al Usono komencis novan epokon de la historio de amika rilato inter Ĉinio kaj Usono, estas ankaŭ nepra tendenco de la historia disvolviĝo. La registaroj de Ĉinio kaj Usono konsideris kaj plifortigis la amikan interrilaton de la du landoj laŭ la tuttergloba strategio, por defendi pacon, sekurecon kaj stabilecon de la mondo. Nuntempe, la internacia situacio estas maltrankvila. La serioza milita kontraŭstaro en Eŭropo, la senĉesa tumultado en Afriko, la Ruĝa Maro, Mez-oriento kaj Sudorienta Azio, precipe la situacio de Hindoĉinio, kie Vjetnamio senskrupule agresas Kamboĝon, indignigis la tutmondan popolon. Kie kuŝas la kaŭzo de tumulto, minaco kaj milito? Ĉiuj klare vidas, ke

la ĉefa kaŭzo de la maltrankvilo estas la avida tuttergloba ekspansio de la hegemoniistoj. Defendo de paco, sekureco kaj stabileco de la mondo kaj opono kontraŭ la tuttergloba ekspansio de la hegemoniistoj estas hodiaŭ urĝa tasko de ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj amegas sendependecon kaj pacon. La amika kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono kaj la popoloj de la du landoj ne nur utilos al la disvolviĝo de la du landoj, sed ankaŭ estos potenca faktoro en defendo de paco de la mondo kaj akcelo de la homa progreso.

Lusin iam diris: "Estos bone se la homoj interkomprenos kaj prizorgos unu alian." Walt Whitman, poeto de Usono, skribis en sia poemo: "Iru! La vojo estas antaŭ ni!"

Jam komenciĝis nova epoko de la historio de amika rilato inter Ĉinio kaj Usono kaj la popoloj de Ĉinio kaj Usono iros antaŭen generacion post generacio laŭ tiu amika vojo.

Vicĉefministro Deng Xiaoping kaj lia edzino gratulas usonajn artistojn post rigardo de ilia prezentado.



Zhuo Lin, akompanata de Rosalynn Carter, vizitas la mezlernejon Hardy en Washington.



Rosalynn Carter okazigis akceptan kunvenon por Zhuo Lin en la domo Meridian de Washington.





*Vicĉefministro
Deng Xiaoping
vizitas la Spacan
Centron Lyndon
B. Johnson en
Houston.*

*Vicĉefministro Deng Xiaoping inter usonanoj de ĉina
deveno kaj la reprezentantoj de ĉinaj elmigrintoj*



Transformiĝo de Ŝlima Marbordo en Fekundajn Kampojn

SUR la ŝlima marbordo oriente de Wenling-gubernio, Zhejiang-provinco (Ĝegiang) kreskas verdaj agrikulturaj plantaĵoj. En la pasinteco tie estis dezerta ŝlimejo, kiu nun fariĝis fekundaj kampoj. Tio estas la unua peco de tero akirita de nia lando de la maro per plantado de granda rizherbo (*Spartina Anglica*).

Antaŭ pli ol dek jaroj tie kreskis neniuj vegetaĵoj. Dum fluso ĝin glutis la marakvo. En 1964, oni plantis tie grandan rizherbon kaj plivastigis la plantareon jaron post jaro. Dek jarojn poste tute ŝanĝiĝis ĝia aspekto: La tero etendiĝis en la orientan maron je kvin kilometroj kaj la pasinta dezerta ŝlimejo fariĝis fekunda agro. Tamen por enkonduki grandan rizherbon oni trairis vojon neglatan.

En 1963, la Ĉina Scienca kaj Teknika Komisiono kunvokis tutlandan konferencon pri agromonia laboro, dum kiu oni diskutis ankaŭ pri akiro de tero per konstruado de mardigo. En la konferenco Ĉefministro Zhou Enlai (Ĝou Enlaj) faris gravan raporton, montrante, ke por solvi la problemon de manĝo de kelkcent milionoj da popolanoj oni devas akiri teron de maro. La parolado de Ĉefministro Zhou forte emociis la blankharan Profesoron Zhong Chongxin kaj vekis en li la memoron pri okazintaĵo antaŭ dudek naŭ jaroj.

Dum sia studado en Usono la profesoro hazarde legis noton pri granda rizherbo en la libro "Scienco de Vivo" de H. G. Wells eldonita en

Anglio, kiu asertas: "De la antikveco ĝis nun estas nur granda rizherbo, kiu povas kontraŭstari la tajdon kaj gajni venkon." Li estis forte mirigita, ke en la mondo eĉ troviĝas tia vegetaĵo. Li pensis en si: Ĉinio havas longajn marbordliniojn kaj vastajn ŝlimajn marbordojn. Se oni plantos tian herbon, oni ja povos ekspluati tiujn terenojn. De tiam li ekinteresiĝis pri granda rizherbo kaj komencis kolekti kaj ordigi materialojn pri tio.

Granda rizherbo estas vegetaĵo ekkonita en la 19-a jarcento. Ĝi estas nature hibridigita de ŝipe alportita amerika spartino (*Spartina atterniflora*) kaj eŭropa rizherbo (*Spartina marifima*) kaj kreskas sur la ŝlima bordo de Southampton de Anglio. La hibrida herbo estas pli alta ol siaj gepatroj, tial oni nomas ĝin granda rizherbo. Ĝi havas fortan rezistivon kontraŭ salo kaj inundo kaj estas tre fekunda. Oni povas utiligi ĝin por akceli sedimenton, firmigi ŝliman bordon kaj protekti digon. Kiel Zhong Chongxin deziris planti grandan rizherbon sur niaj ŝlimaj marbordoj, post kiam li revenis al la patrolando en 1935! Sed en la malnova Ĉinio la scienca afero ne ricevis subtenon de la registaro, kaj la profesoro kiu apenaŭ povis sin vivteni, tute ne havis forton por planti grandan rizherbon. Tiu-tempe ne nur semo kaj herbidoj estis ne akireblaj, sed eĉ la materialoj pri la granda rizherbo pene kolektitaj de la profesoro dum multaj jaroj perdiĝis en 1946 pro akcidento de varŝipo. Lia deziro fariĝis vana revo. Aŭskultinte la fortan al-

vokon de Ĉefministro Zhou en la konferenco, Zhong Chongxin ekbrulis de arda espero.

En la konferenco Zhong Chongxin proponis enkonduki grandan rizherbon. Ekster lia atendo lia propono ricevis varman aprobon de la kunvenantoj. Koncernaj centraj fakoj tuj komencis labori. Unuflanke ili kolektis semon de granda rizherbo de Anglio, aliflanke sendis Profesoron Zhong Chongxin al Anglio kaj Nederlando por fari esploradon.

Februare, 1964, Zhong Chongxin kunportis al Nanjing (Nankino) pli ol 500 grajnoj da semo de granda rizherbo senditajn el Anglio. Li senprokraste semis la unuajn semojn ripetfoje lavitajn per distilita akvo kaj bone sterilizitajn. Tamen, la eksperimentado ne iris glate. Post nelonge la ĵus elkreskintaj herbidoj velkis. La kaŭzo estis ke en la grundo troviĝis sarkilaj fungoj (*Fusarium sp.*) malfavoraj al kreskado de la herbidoj. Post multfoja eksperimentado Zhong

Chongxin kaj liaj asistantoj finfine sukcesis kreskigi herbidojn en malseka medio. En malpli ol dek monatoj pli ol 30,000 herbidoj kreskis en akva vazo. Rigardate de malproksime la verdaj vivoplenaj herbidoj similis al rizplantidoj kaj malgrandaj fragmitoj.

Tamen oni ankoraŭ ne estis certaj ĉu la herbidoj povas elteni venton kaj ondojn. Laŭ literaturo, nemalmultaj landoj en la mondo enkondukis grandan rizherbon, tamen malsukcesis senescepte la enkondukaj provoj en iuj regionoj kaj landoj de Azio.

En frua somero de 1964, Zhong Chongxin kaj liaj asistantoj venis al la ŝlima bordo ĉe la buŝo de Qiantang-rivero, Zhejiang-provinco kaj provplantis grandan rizherbon en sterila kanalo fosita de tajdo. Sur la dezerta ŝlimejo vidiĝis nek homo, nek arbo. Por observi la leĝon de la tajdo, la atmosferan temperaturon kaj kreskadon de la herbo, ili tuttage restis ĉe la rivero. Tage, kaŭ-

Prof. Zhong Chongxin kaj aliaj esploras kreskejon de granda rizherbo de Qidong-gubernio.



rante sub bruliga suno ili kalkulis donitajojn de kreskado de granda rizherbo, nokte ili ne povis bone ripozi pro pikado de moskitoj. La tajdo de Qiantang-rivero inunde flusas. Foje la tajdo inundis la herbon kelkajn diurnojn, pri kio la profesoro tre maltrankviliĝis. Li sciis, ke en aliaj landoj ankoraŭ neniam okazis, ke granda rizherbo eltenis inundon por unu diurno. Feliĉe, post la malfluso plejparto de la herbidoj postvivis. Sed post pluva sezono de julio, tie falis neniu pluva guto. Ili devis vektporti akvon por akvumado. La praktiko pruvis, ke tiu loko ne taŭgas por kreskado de granda rizherbo.

Profesoro Zhong Chongxin kaj liaj asistantoj venis al aliaj ŝlimaj marbordoj por fari vastan eksperimentadon. Fine ili elektis tiun de Wenling-gubernio por planti grandan rizherbon en granda areo. Tiu loko tre favoras kreskadon de granda rizherbo. Ĉiu herbido rapide kreskis kaj multobliĝis. Antaŭe tieaj popolanoj konstruis mardigon por akiri teron ĉefe per natura malrapida sedimentado. Tiel formiĝinta tero estas sterila kaj povas produkti grenon nur en malgranda kvanto post multjara transformado. Kulturado de granda rizherbo rapidigis la sedimentadon preskaŭ duoble. Sur la akiritaj kampoj oni povas kulturi grenplantaĵojn kaj gajni altan produktokvanton en la sama jaro. La lokoj kie kreskas granda rizherbo samtempe taŭgas ankaŭ por paŝtado. Nun tie tritiko ondas en printempo, dum en aŭtuno verdas batato, asparago kaj mandarinarboj. La areo de ekspluatita ŝlima marbordo en la gubernio jam atingis 353 hektarojn. Dank' al grandskala kulturado de granda rizher-



Profesoro Zhong Chongxin

bo en Qidong-gubernio, Jiangsu-provinco (Giangsu) antaŭa herbejo transformiĝis en bonan paŝtejon kun areo de 3,000 hektaroj.

Nun en nia lando, de Jingxi-gubernio, Liaoning-provinco (Liaŭning) en la nordo ĝis Dianbai-gubernio, Guangdong-provinco en la sudo, 53 apudmaraj gubernioj kulturis grandan rizherbon en pli ol 10,000 hektaroj kaj atingis rimarkindajn sukcesojn en sinteza utiligado. Tio estas varme bonvenigata de marbordaj popolanoj. En la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en 1978, la sukceso en scienca esplorado pri granda rizherbo estis premiita per honora diplomo kaj estis difinita kiel ekspozicia objekto.

Vizito al Xiashitang-brigado



VINTRE de 1978, mi vizitis Xiashitang-brigadon, Yibin-gubernio de suda Sichuan-provinco (Siĉuan). Dum la vizito mi konatiĝis kun kvin blankharaj maljunaj ruĝ-armeanoj. Post sia vizito, ili ĝoje ekbabilis kaj unuvoĉe laŭdis la brigadon. Iu pli-ol-60-jara eksarmeano diris kun ekscitiĝo: “Lernu de Dazhai (Daĝaj) kaj kuratingu ĝin! Jen Xiashitang-brigado jam superis ĝin! Por modernigo de agrikulturo necesas tia energia strebado!”

NOVA VILAĜO

Xiashitang-brigado situas ĉe la bordo de Minjiang-rivero. Ĝi havas 160 familiojn kun 762 membroj kaj pli ol 42.5 hektarojn da kampoj. En 1963, pro daŭra natura katastrofo, la brigado tiel malriĉiĝis, ke ĝi posedis nur 3 porkojn kaj 7 bovojn, ĝia hektara produktokvanto de greno estis 3,675 kilogramoj, la jara porcio de greno por ĉiu persono estis nur 163.5 kilogramoj kaj ĉiu labortago kostis malpli ol 30 cendojn.

Dum la lastaj 15 jaroj la ekonomio de la brigado rapide disvolviĝis. Ĝi entreprenas ne plu sole

agrikulturon, sed ankaŭ flankokupojn, industrion kaj aliajn aferojn. Nun en la brigado troviĝas 4 porkobredejoj, grenprilaborejo, brikfarejo kaj ŝiptransporta taĉmento. La produktovaloro de flankokupoj kaj industrio de la brigado jam superis tiun de agrikulturo. Antaŭe la brigado havis nenian agrikulturan maŝinon. Nun ĝi posedas pli ol 40 maŝinojn kaj fundamente realigis meĥanizon en plugado, drenado, irigaciado, draŝado, rizsenŝeligo, muelado kaj prilaborado de furaĝo. La produktado de la brigado rapide disvolviĝis: la hektara produktokvanto de greno pliiĝis ĉiujare je 11%, kaj la totala produktov valoro de agrikulturo, flankokupoj kaj industrio je 12%. Ekde 1977, ĝia hektara produktokvanto de greno superis 15 tunojn, la jara porcio de greno por ĉiu homo atingis 350 kilogramojn kaj ĉiu labortago kostis 2 juanojn.

Kiam ni venis al Xiashitang-brigado, prezentiĝis antaŭ niaj okuloj tute prospera bildo. En la vilaĝo, vicoj da novaj domoj staras laŭlonge de montpiedoj kaj etendiĝas unu kilometron foren. Fronte de la vilaĝo sin trovas draŝejo, kaj

Bone flegataj kampoj




sur la kampoj kreskas tritiko, kolzo kaj aliaj printempaj plantaĵoj, kiuj formis verdan tapiŝon kiu kovras la tutan teron. Post la vilaĝo estas montdeklivo kun grandaj terpecoj da mandarinarboj, pirarboj kaj pomarboj. Tage bruas maŝinoj kaj kuras traktoroj, nokte la vilaĝo baniĝas en briloj de elektraj lampoj kaj ŝvebadas ĉie ĉarmaj kantoj. Kampanoj en apudaj vilaĝoj kaj pasaĝeroj vojaĝantaj per ŝipo sur Min-jiang-rivero senescepte admiras tiujn kortuŝajn scenojn en la vilaĝo.

SUR LA VOJO DE DISVOLVO

Dum mia restado en Xiashitang-brigado, interparolinte kun la kadroj kaj komunumanoj kaj vizitinte iliajn domojn, mi sciis, ke la brigado iris malfacile zigzagan vojon por gajni la hodiaŭajn sukcesojn.

En printempo de 1964, la brigado reelektis sian gvidantaron kun Yang Zhiguo kiel ĝia estro. Li iom konas la ekonomian kalkulon kaj havas vastan vidkampon. Vizaĝe al la malriĉa montvilaĝo, li kun plena fido diris al la kadroj kaj

Novaj loĝdomoj de komunumanoj





*Infanoj de la brigado
en elementa lernejo*

komunumanoj: “Tiel en agrikulturo, kiel en industrio, por akiri rapidan disvolviĝon kaj ŝanĝi la fizionomion, necesas ne nur entuziasmo, sed ankaŭ monrimedoj. Tial, samtempe kun disvolvado de la agrikulturo ni devas plenforte disvolvi flankokupojn kaj industrion.”

Tamen, tiutempe al la brigado mankis mono. Ili prunteprenis 600 juanojn por aĉeti malnovtipan muelilon kaj tiel ekfunkciigis muelejon. Per la gajnita mono ili aĉetis porkojn kaj ilin bredis per la ricevita tritikbrano. La porkoj donis multon da sterko, dank’ al kio la hektara produktokvanto de greno de la brigado tiujare atingis 6,000 kilogramojn. En la jarfino, la komunumanoj ne nur ricevis pli multe da greno sed ankaŭ pli multe da mono. Por ke la komunumanoj ĝoje pasigu la tradician Printempan Feston, la brigado provizis ilin per sukero, viando, manĝoleo, vermiĉeloj kaj spagetoj. Ĝuante la materian profiton akiritan per sia diligenta laboro, la komunumanoj eklaboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo en la sekvanta jaro.

En 1966, la brigado konstruis hidroenergian stacion, aĉetis novan muelilon, rizsenŝeligilon kaj dispecigilon kaj pligrandigis la prilaboran indus-

trion de agrikulturaj kaj flankokupaj produktadoj. Sekve, per la akumulita mono la brigado disvolvis sian porkobredadon, aĉetis kemistikon, insekticidon kaj aliajn maŝinojn por disvolvi la agrikulturan produktadon, rezulte de tio la hektara produktokvanto de greno leviĝis ĝis 6,975 kilogramoj. Havante multon da greno kaj mono, la brigado fondis brikfarejon kaj konstruis ŝipojn por transportado. Dank’ al tio pli kaj pli multiĝis la akumulita mono kaj pretiĝis favoraj kondiĉoj por agrikultura meĥanizo. Ekde 1967, ĉiu labortago de la brigado kostis 1.5 juanojn, kaj tio multe superis la meznombrian nivelon tiutempe en la tuta gubernio.

Ĝuste en tiu tempo, influite de la linio de Lin Biao kaj la “kvarpersona bando”, iuj kalumniis la brigadon, ke anstataŭ teni klasbatalon ĝi ĉasas nur monon kaj praktikas materian stimulon. Printempe de 1969, la gvidanto de la gubernio pri agrikulturo publike proklamis en iu kunveno, ke la brigado estas “tipo de kapitalisma vojo”. Iufoje, la brigado aĉetis por si dizelon. Kiam la komunumanoj pretis porti ĝin el la staplo, venis iu kadro kaj diris: “Via brigado iras kapitalisman vojon kaj estas unuo de nigra flago. La

maŝinon ni ne povas vendi al vi.” Poste brigadestro Yang Zhiguo organizis la kadrojn kaj komunumanojn por diskuti pri tio. Ĉiuj opiniis, ke ili ne faris ekspluatadon, do ne praktikas kapitalismon. Ili decidis ĉiurimede disvolvi la flankokupojn kaj industrion, malgraŭ kalumnioj.

La afero ricevis subtenon de plimulto. Opiniante, ke la brigado iras ĝustan vojon, iuj kamaradoj de la subprovinca, gubernia kaj distrikta partikomitatoj sentime elpaŝis por protekti la brigadon kaj kuraĝigis la komunumanojn marŝi laŭ sia vojo. De la lastaj jaroj, la brigado kontinue gajnis riĉajn rikoltojn en agrikulturo, kaj ĝia produktovaloro de flankokupoj kaj industrio jam superis tiun de agrikulturo. En 1978, ĝia hektara produktokvanto de greno atingis 17,055 kilogramojn kaj la produktovaloro de flankokupoj kaj industrio konsistigis 58.2% de la totala produktovaloro de agrikulturo, flankokupoj kaj industrio.

LAŬPAŜA ALTIGO DE LA VIVNIVELO DE LA KOMUNUMANĜOJ

Dank’ al la disvolvo de kolektiva ekonomio kaj senĉesa kresko de la kolektiva bonstatiga fonduso, la brigado faris multajn kolektivajn bonstatigajn servojn. Oni diris al mi, ke en la brigado la komunumanoj ĝuas senpagan servon en 16 aferoj, nome vartado de infanoj, vizito al infanĝardeno, elementaj kaj mezaj lernejoj, vestofarado, barbirado, spektado de filmoj, kuirado de rizo, livero de bolinta akvo, kuracado per drogherboj, rizsenŝeligo, muelado, prilaborado de furaĝo, veturado kaj transportado per ŝipoj de la brigado, riparado de domoj, aranĝo de geedziĝa kaj funebra ceremonioj ktp. Por iuj aliaj servoj la komunumanoj pagas nur tre tre malmulte, ekzemple, la brigado liveras al ĉiu komunumano ĉiujare 250 ĝis 300 kilogramojn da legomoj de pli ol 40 specoj, kaj la komunumano pagas nur 2 cendojn kontraŭ 1 kilogramo. Tiuj bonstatigaj servoj ne nur favoris la produktadon, portis oportunojn al la vivo de la komunumanoj kaj altigis ilian aktivecon, sed ankaŭ liberigis grandan nombron da virinoj el la peza dommas-trumado.

La vivnivelo de la komunumanoj de la brigado jam egalas aŭ superas tiun de oficistoj kaj laboristoj en mezgrandaj kaj malgrandaj urboj de Sichuan-provinco. Ekde 1977, la kosto de ĉiu labortago de komunumano estis pli alta ol la meznombra taga salajro de urbaj oficistoj kaj laboristoj. Dum la jarfina distribuado, pliparto de la familioj ricevis kontantan monon de ĉirkaŭ mil juanoj, iuj eĉ pli ol 3 mil juanojn. La meznombra konsumita kvanto de ĉefaj manĝaĵoj por ĉiu persono estas: greno — 350 kilogramoj, porkaĵo — 22.5 kilogramoj, legomoj — ĉ. 300 kilogramoj. La komunumanoj plej fieras pri tio, ke ili havas kontentigajn loĝejojn. En la brigado nun 126 familioj loĝas en novaj brikdomoj. La meznombra plankareo por ĉiu persono atingis 15 ĝis 20 kvadratajn metrojn. Mi vizitis kelkajn familiojn. Parolante pri la nuna vivo, ĉiuj estas emociitaj de la hodiaŭa feliĉo alportita de socialismo kaj plenaj de fido al pli bela estonteco.

Mi vizitis la brigadon ĝuste en la tempo de la jarfina distribuado de 1978. En la lasta jaro, la brigado ree gajnis pliprodukton de agrikulturo, flankokupoj kaj industrio. La totala produktokvanto de greno pliiĝis je 9.2% ol tiu en 1977. Tiu brigado akiris ankaŭ riĉajn rikoltojn de sukercanoj, arakidoj, kolzosemo kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj. La totala enspezo de agrikulturo, flan-

Kudrogrupo de la brigado



kokupoj kaj industrio pliiĝis je 12.6% ol tiu en 1977. Por rapide modernigi la agrikulturon, la brigado akumulis ankoraŭ pli multan kapitalon, sed ne reduktis al la komunumanoj la grenan porcion kaj monan enspezon kompare kun tiuj en 1977. En la jarfina distribua mitingo, la partifilio de la brigado honoris 13 avangardajn produktantojn kaj modelojn kaj premiis ilin ĉiujn.

Konigante al mi pri la disvolvado kaj estonta plano de la brigado, Yang Zhiguo, sekretario de la brigada partifilio esprimis, ke la brigado ne fieriĝos pro laŭdoj kaj klopodos plu kuraĝigate de la atingoj. Ĝi certe lernos de pli avangardaj unuoj por gajni ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en 1979 omaĝe al la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.



La Konstanta Konsilantaro de ĈEL Okazigis Kunvenon

Je la 21-a de februaro, 1979, la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis la unuan kunvenon ĉi-jare en Beijing (Pekino). En la kunveno oni prezentis esperantajn aktivadojn de la Universala Esperanto-Asocio kaj de nia lando kaj diskutis pri laboroj de la

kuranta jaro. La kunveno emfazis, ke la ligo devas aktive kuraĝigi kaj subteni esperantajn aktivadojn de diversaj lokoj enlande, kaj samtempe ĝi plifortigas kunlaboron kun koncernaj unuoj por bone plenumi la esperantan eldonadon. Krome ili diskutis ankaŭ la problemon de

reciproka vizito inter ĉinaj kaj fremdlandaj esperantistoj. La kunveno donis inspiron al esperantistoj de nia lando.

Vasto Esperanto-Grupo, Italio

Foto farita okaze de la unua ekzameno de Esperanto en Vasto kaj vidiganta la gekandidatojn kaj membron de la ekzamena komisiono Pastron Riccardo Di Prinzi, kiu estas malnova leganto kaj amiko de El Popola Ĉinio.



KORESPONDI DEZIRAS

* Venezuela junulo dez. kor. kun ĉinaj amikoj. Adr.: David G. Valcillos V., Calle 79 No. 3C-72, Maracaibo, Venezuelo.

* Hiromi Mukaihata, 14-j. japana lernantino, kun ĉinaj gelearnantoj. Adr.: 4-28 Taisyo-cyo, Nakamura-ku, Nagoja-shi, Aichi 453 Japanio.

* Dragomir Pejic, Nikole Zrinjskog 12, 25000 Sombor, Jugoslavio (19-j. junulo), kun esp-istoj tm.

* Andreo Hosinski, 28-j. radioteknikisto edzigita, kun ĉinaj gemikoj kaj gekolegoj. Adr.: Ul. Sieniawska 17/13, 68-200 Zary, Pollando.

* Joĉjo Schuppel, 47-j. fervojlaboristo, volas interŝ. pk kaj leterojn kun ĉinaj esp-istoj. Adr.: DDR-77 Hoyerswerda, Am Bahndamm 12, Germana Dem. Resp.

* S-ino Therese Sabatier, 21 rue Pasteur, 94490 Ormesson, Francio, kun ĉinaj geesp-istoj.

Emei-montaro




Tagiĝo ĉe Emei



Ugantaj nuboj

La pinto de Emei




Du Fontoj Lavas Bovkoron





Nubomaro

templo



Budha statuo en Wannian-templo





Strio de la Ĉielo

Si Xia kaj Ŝiaj Lernantoj



Si Xia kiel juĝistino en la ludo

EN somero de 1978, Nanjing (Nankino) suferis de neordinara varmego. Dum duonmonato la temperaturo restadis ĉ. 40° C. Sub la arda suno Si Xia, proksimume 70-jara ĉefinstruistino de la unua klaso de la Dependa Elementa Lernejo de la Nanjing-a Pedagogia Kolegio, vizitadis kiel kutime unu post alia la hejmon de siaj lernantoj, tra stratoj kaj stratoj.

Tio estas ŝia kutimo de multaj jaroj. Ĉiu-semestre kiam la lernejo akceptas novajn lernantojn, ŝi faras vizitadon al iliaj hejmoj por koni iliajn familiojn, personajn sciojn, ŝatojn kaj vivkutimojn. Dank' al tio ŝi povas scii la nomon de ĉiu lernanto jam en la unua leciono kaj la infanoj, ĵus enirintaj la lernejon ne sentas ĝenon ĉe la instruistino.

Si Xia eklaboris en elementa lernejo jam de la aĝo de 17 jaroj, kaj de multjare ŝi funkcias kiel ĉefinstruistino de la unua klaso. Ŝi bone scias, ke antaŭ sia vizito al lernejo, la infanoj jam posedas certajn sciojn akiritajn en sia hejmo aŭ en infanĝardeno. Pro tio, Si Xia ĉiam metas sian ĉefan energion por ke ili disvolu la lernitajn sciojn, perfektigu siajn kapablojn de memoro, imago kaj kompreno kaj absorbu novajn sciojn.

En lernolibro la vorto "patrolando" estas iom abstrakta kaj malfacile klarigebla por infanoj. Si Xia demandis la lernantojn: "Kiu scias, kion signifas patrolando?" Iu infano respondis: "Patrolando estas lando." Si Xia demandis plue: "Ĉu pravas tia respondo?" Multaj respondis: "Ne." Kaj unu levis sian manon kaj diris: "Patrolando estas nia propra lando." Si Xia tuj

jesis kaj plie precizigis: "Prave, patrolando estas nia propra lando, kie vivis niaj praaĵoj, de generacio al generacio ĝis ni mem."

Post klarigo de la frazo "Kiel dikaj estas rizgrajnoj" Si Xia taskis al ĉiu infano fari frazon uzante la vorton "dika". Iu diris: "Grajnoj de tritiko estas dikaj." Alia diris: "Grajnoj de fabo estas dikaj." Si Xia subite levis sian vortaron kaj demandis: "Kia estas la vortaro?" La lernantoj diris: "Ĝi estas dika." Ŝi demandis plue: "Ĉu viaj kajeroj estas dikaj aŭ maldikaj?" La lernantoj unuvoĉe respondis: "Ili ne estas dikaj, ili estas maldikaj." Kaj tiel la lernantoj ellernis la diversajn uzadojn de la vorto.

Ni rigardu, kiel Si Xia eksplikas la tekston de la leciono pri hirundo. En la leciono ŝi devas klarigi al la lernantoj tri novajn vortojn: "xian" (buŝteni), "ni" (argilo) kaj "zhan" (glui). Elpreninte el skatolo bulon da flava argilo per la maldekstra mano ŝi diris al la lernantoj: "Jen estas 'ni'". Poste ŝi kunŝovis la fingrojn dikan, montran kaj longan de la dekstra mano imitante la formon de hirunda beko, per kiu ŝi prenis argilon kaj algluis ĝin sur la bulon en la maldekstra mano. Tiel ŝi klarigis tiujn vortojn ripetade. Per la vigla demonstrado, lerta demando kaj interesa imitado, Si Xia gravuris la instruatajn vortojn kaj frazojn en la memoron de la lernantoj.

Si Xia ofte enketas ĉe la lernantoj pri sia instrumaniero. Foje ŝi skribis sur la nigra tabulo. Por ke la lernantoj povu klare vidi ŝian skribadon, ŝi staris oblikve por ne malhelpi al la ler-

nantoj la vidon. Tio kaŭzis ke ŝi faris vertikalan strekon oblikve, kaj pluraj lernantoj rimarkis tion kritike. Ĉiuj faris siajn kritikojn laŭ siaj vidpunktoj. Si Xia laŭdis ilin kaj korektis sian skribaĵon. La lernantoj tre kontentas kaj eĉ pli amas ŝin.

La sonorilo sonis por leciona horo. Gelernantoj rapidis svarme en la klasĉambro, iuj havis tute ruĝajn vangojn, aliaj ŝvitis kaj triaj ankoraŭ mallaŭte daŭrigis la kvereleton nefinitan dum la ludo. Vidinte tion Si Xia montris nenian malpaciencon. Ŝi diris milde: “Mi vidas ke iuj lernantoj ankoraŭ ne estas tute pretaj por ricevi lecionon, nun mi eliras momenton por ke ĉiuj havu tempon rapide aranĝi sin en bona ordo.” Kiam Si Xia denove eniris la klasĉambro, ĉiuj jam sidis bonorde kaj koncentris sian atenton al la eniranta instruistino.

Kio estas forto, kiu igas la infanojn tiel obei la instruistinojn? Sperto diras al ŝi, por ke la infanoj respektu la instruiston, la lasta devas unue kredi kaj estimi siajn lernantojn. Si Xia opinias, ke kvankam ili estas malgrandaj infanoj, tamen ili havas fortan memestimon. Se oni ĝin vundus malatente, tio eble kaŭzus malbonan konsekvencon. Tio ja estas malsukceso en edukado.

Kiam infanoj kulpis pri io, Si Xia neniam laŭte riproĉas ilin, sed pacience helpas ilin konsciĝi pri tio kaj korekti siajn erarojn. Foje iu

Si Xia donas lecionon.



lernanto ploris en la klasĉambro, ĉar ŝia lernolibro estis ŝirita de iu nekonata. La klasĉambro falis tute en malordon. Pro kruda sinteno de juna instruisto-praktikanto, la libroŝirinto des pli ne kuraĝis konfesi sian kulpon. Tiam Si Xia envenis. Anstataŭ provi malkovri la libroŝirinton ŝi unue klarigis kviete, kial oni devas protekti siajn lernolibrojn ne nur sian sed ankaŭ tiun de alia. Ŝi diris plie: “Kiu ja neniam faris eraron? Ni ĉiuj faris ian eraron. Sed ne gravas fari erarojn, gravas tio ke oni devas konfesi kaj kompreni sian eraron. Tiu, kiu tiel agas, meritas esti laŭdata. . .” Antaŭ ol la instruistino finis sian parolon, iu lernanto stariĝis dirante, ke la lernolibro estas ŝirita de li kaj laŭ postulo de la instruistino petis pardonon de tiu ploranto. La klasĉambro estis ree en ordo, kaj ĉiuj lernantoj ricevis en tio instruon.

Diligenta ĝardenisto plej amas siajn kulturatajn florojn kaj plantojn. Si Xia ĉiam prizorgas siajn lernantojn, ne nur pri ilia kresko en ideologio, sed ankaŭ pri iliaj vivo kaj sano. Ekz. ŝi helpas lernantinojn en kombado de malordigita harplektaĵo kaj atentigas lernantojn pri malvarmumo, kiam ili demetas sian veston; kaj en subitaj malvarmiĝo de la vetero ŝi ofte prenas vestojn de siaj infanoj el loĝejo por doni al lernantoj maldike vestitaj. Kiam lernanto malsaniĝis, ŝi zorge kuŝigis lin sur sian liton. Ne estas mirinde, ke lernantoj kiuj finis la studon jam multajn jarojn, ofte venis por ŝin viziti. Ili ĉiam diris kun dolĉa rememoro: “Instruistino Si, tiun ĉi vian lanveston mi iam portis.” “Instruistino Si, sur tiu ĉi via lito mi ja foje kuŝis.”

Pro sia zorgemo kaj amo al la lernantoj Si Xia havas tre grandan fidon de iliaj gepatroj. En la klaso troviĝas tri lernantoj, kiuj perdis sian patrinon. Kiam ilia patro devas plenumi ian mision aliloke, ili ofte konfidis al la instruistino sian infanon. Si Xia ne nur instruas ilin tage en la lernejo, sed ankaŭ prizorgas ilian vivon vespere. Ŝi estas eĉ pli zorgema ol iliaj patrinoj.

La lernantoj havas pli intiman rilaton kaj pli profundan respekton al Si Xia ol al siaj propraj patrinoj. Kiam Si Xia iom malsaniĝis aŭ raŭkiĝis ŝia voĉo, lernantoj ĉiam admonis: “Instruisti-

no Si, vi iom ripozu!” “Instruistino Si, vi parolu pli mallaŭte!”

Pro tio Si Xia estas respektata de la socio kaj glore elektita kiel avangarda pedagogo kaj popola reprezentanto de la Tria kaj la Kvinna Tutlandaj Popolaj Kongresoj. En la jaro 1978 ŝi estis elektita kiel superklasa instruistino. La popolo donis al Si Xia meritan honoron. Kiam oni decidis ke ŝi laboru kiel gvidanto de la Eduka Buroo de Nanjing, ŝi tamen ne volas forlasi la klasĉambron kaj infanojn.

Iutage kiam ĵurnalisto venis al la elementa lernejo, estis ĝuste interleciona tempo. La infa-

noj estis en ludado “ĉaso de sovaĝaj anasoj” (t.e. trafi per pilko tiujn kiuj ludas rolon de sovaĝa anaso en cirklo). Demalproksime oni jam vidis, ke iu instruistino vigle saltas jen tien jen ĉi tien kune kun la lernantoj. “Ankoraŭ unu anaso ne trafita! Ankoraŭ unu ne trafita!” “Rapide, rapide!” Iu infano ĵetis la pilkon en la manon de la instruistino kaj la lasta senprokraste faris falsan movon kaj tuj per la pilko trafis la sovaĝan anason. “Ha! Trafite! Trafite!” Tuj kriis gaje la infanoj.

La instruistino estas ĝuste Si Xia. Ha, ŝi ja estas inter infanoj. . .

Inspiro de Legendo pri Orelringoj

de XU RUIZHENG

ONI diras, ke antaŭ tre tre longa tempo, ĉe piedo de Damao-monto en la suda Ĉinio, estis laborema kaj bonkora knabino. Kun paro da grandaj kaj brilaj okuloj ŝi aspektis tre saĝa kaj bela, kaj ŝi havis manojn tre lertajn en ŝpinado, teksado kaj terkulturado. Ŝin laŭdis ĉiuj en la ĉirkaŭaĵo. En iu aŭtuno la knabino kolektadis hejtaĵojn sur la monto dum pluraj tagoj. Pro troa laciĝo kaj malvarmumiĝo ŝi subite sentis en iu tago neelteneblan doloron en la okuloj, kiuj ektimis venton kaj lumon. Vidinte tion, la gepatroj de la knabino brulis de maltrankvilo kaj ĉie petis kurachelpon. Ankaŭ la najbaroj alrapidis por vidi ŝin kaj iuj eĉ petis favoron de dioj por ŝi. Sed ĉi tio ne povis mildigi ŝian malsanon. Ŝiaj okuloj tiel ŝveliĝis, ke



Xu Ruizheng en serĉado de pli efika pikpunkto sur la orelo

ili similis al juglandoj kaj post kelkaj tagoj ŝi tute perdis la vidkapablon.

Iun tagon, subite venis de sur la monto viro en robo, kiu tintigis sonorileton en la mano kaj murmuris en la buŝo: “Mi havas sekretan recepton hereditan de la praavoj por kuraci ĉiujn okulmalsanojn!” Aŭdinte tion la gepatroj de la knabino tre ĝojis kaj invitis lin en sian domon. Ekzameninte la okulojn de la knabino la kuracisto konsolis ĉiujn, dirante: “Bagatela malsaneto. Vi ĉiuj trankviliĝu, mi certe ĝin forigos.” Ĉe tio li elprenis brillan arĝentan pinglon kaj pikis la lobon de la oreloj de la knabino. En palpebrumo, la knabino sentis klarecon en la okuloj kaj serenecon en la koro. Malferminte la okulojn, ŝi klare vidis ĉion kiel

antaŭe. Ĉiuj ĉeestantoj tre ĝojis kaj volis danki la viron, sed tiam ekblovis vento, leviĝis strioj da blankaj nuboj kaj malaperis la kuracisto. La patro de la knabino bruligis incenson kaj kandelojn kaj riverencis surgenue al la feo. La knabino farigis al si paron da arĝentaj orelringoj kaj ilin portadis dum la tuta vivo por memoro. De tiam cirkuladis inter popolanoj la rakonto pri kuracado de okulmalsano per pikado de orelobo kaj pli kaj pli multiĝis portantoj de orelringoj.

Eble oni diras, ke la legendo estas nur nekredbla rakonto. Tamen mia propra sperto pruvis, ke ĝi entenas veron. Antaŭ dekelkaj jaroj, mi, kiel membro de la medicina taĉmento, venis al la kamparo por ekzameni al kamparanoj skistosomozon. Ni elprenis sangon el orelobo per pikado por ekzameno. Iun matenon, antaŭ ol ni ellitiĝis, iu junulo kun korbo da kokovoj kaj arakidoj venis al nia medicina taĉmento. Apenaŭ li paŝis en la pordon, li diris: "Dankon al vi, bonaj kuracistoj, ke vi forigis okulmalsanon de mia patrino. Jen donaco por esprimi la koran dankon de nia tuta familio!" Rigardante unu la alian, ni ne sciis, kio okazis. Tiam li diris, ke post la elpreno de sango, lia patrino jam povis klare vidi per la malsana okulo post dormado. El la praktiko ni scias, ke pikado de iuj punktoj sur la oreloj efikas por kuraci akutan konjunktiviton, korneiton, hordeolon kaj aliajn okulajn malsanojn kaj altigi vidkapablon. Tial portado de orelringoj kelkiam efikas en kuracado de okulmalsanoj.

El tiu rakonto ni povas scii, ke pikado sur oreloj estis antaŭlonge aplikata de nia antikva laboranta popolo por kuraci okulmalsanojn. La aplikado de tiu kuracmetodo malkovris sekreton

de la oreloj, ke ili ne nur estas la organo de aŭdkapablo, sed ankaŭ havas nedisigeblan rilaton kun aliaj organoj de la homa korpo. Laŭ anatomio, al la oreloj kondukas branĉoj de triĝemina, vizaĝa kaj pneŭmogastra nervoj el cerbaj nervoj, kaj ankaŭ aŭrikla granda nervo kaj okcipita minora nervo. Nia tradicia medicino opinias, ke sur la oreloj ĉiuj internaj organoj de la homa korpo havas sian refleksan sferon, kaj sur la malgranda orelo sin trovas pli ol cent akupunkturaj pikpunktoj.

Per tia kuracmetodo oni povas reguligi nervan ekvilibron kaj sangcirkuladon, mildigi doloron kaj jukon kaj fortigi funkciadon de lieno kaj reno. En kliniko ĝi povas kuraci neŭrastenion, funkcion malordon de aŭtomatika nervo, akutan tordlezon kaj aliajn traŭmatojn, kaj nervajn, bakteriajn kaj toksajn malsanojn. Laŭ nekompleta statistiko, tiu terapio estas aplikebla por kuraci internajn malsanojn kaj ankaŭ tiujn en ĥirurgio, ginekologio, pediatrio, otorinolaringologio, oftalmologio, neŭrologio, dermatologio, k. a.

Mi min okupis pri tiu terapio jam 15 jarojn kaj resanigis per ĝi multajn pacientojn en urboj kaj kamparoj. Sur bazo de klinika praktiko mi faris teoriant studon en la lastaj jaroj. Mi atente kolektis en- kaj eksterlandajn materialojn, ripetade observis kaj difinis akupunkturajn pikpunktojn de la orelo kaj faris desegnaĵon kaj modelon de oreloj kaj pikpunktoj. Ni trovis, ke iuj malsanoj havas apartan fenomenon sur petro. Tamen komplika estas la rilato inter la oreloj kaj la aliaj organoj kaj diversaj malsanoj kaj pri tio oni ankoraŭ ne povas plene klarigi ĉion en teorio.

❖—————❖
(Daŭrigo de p.31)

tradukitaj laŭsence. La popularaj transskribaj formoj de historiaj loknomoj povas esti uzataj senŝanĝe. Se estas necese, oni povas ilin transskribi per la nova sistemo kaj samtempe meti la kutiman en parentezo. La malnovaj komercaj markoj povas esti daŭre uzataj senŝanĝe, sed la novaj devas esti transskribitaj laŭ la nova sistemo. La diversaj sciencaj nomoj laŭ ĉinaj perso-

naj aŭ lokaj nomoj transskribitaj laŭ malnova sistemo povas esti uzataj kiel antaŭe, sed en la estonteco, la nova fonetika projekto devas esti uzata en transskribo de ĉinaj personaj aŭ lokaj nomoj koncernataj de sciencaj nomoj de nove trovataj specioj k.s.

Ekde n-ro 4, ankaŭ nia gazeto aplikos la hantlingvan fonetikan alfabeton en transskribado de ĉinaj propraj nomoj.

La Han-lingva Fonetika Alfabeto Uzata en Transskribo de Ĉinaj Propraj Nomoj

JE la fino de 1978, la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko sciigis la lokajn registarojn kaj koncernajn instituciojn de nia lando, ke ili uzu la han-lingvan fonetikan alfabeton en transskribo de la ĉinaj propraj nomoj.

Laŭ la decido de la Ŝtata Konsilantaro, la Ministerio de Eksteraj Aferoj de nia lando sciigis al la diverslandaj diplomaciaj oficejoj en Ĉinio, ke ekde la 1-a de januaro de 1979, la ĉinaj propraj nomoj en diplomaciaj dokumentoj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko estos transskribitaj per la han-lingva fonetika alfabeto.

La dokumento de la Ŝtata Konsilantaro difinas: La propraj nomoj de nia lando transskribitaj per la han-lingva fonetika alfabeto estos uzataj en ĉiuj latinliteraj lingvoj kiel ekzemple, la angla, franca, germana, hispana kaj Esperanto.

La dokumento montras: La transskribo de ĉinaj propraj nomoj per la han-lingva fonetika alfabeto estas grava paŝo por likvidi la ĥaoson longe ekzistantan en transskribo de ĉinaj personaj kaj lokaj nomoj per Wade kaj aliaj sistemoj.

Wade estis brita diplomato iam laborinta kiel sekretario de la brita ambasadorejo en Ĉinio. En 1867 li verkis lernolibron pri la Beijing-a oficiala lingvo "Yu Yen Tzŭ Erh Chi", en kiu li montris la elparolon de han-aj vortoj per latinaj literoj kaj lian sistemon oni nomas Wade-sistemo. En la komenco tiu sistemo estis uzata nur de laborantoj en ambasadorejoj en Ĉinio por lerni la han-an lingvon. Poste oni plivastigis ĝian uzon al transskribo de ĉinaj propraj nomoj en anglalingvaj eldonaĵoj. Ĉar en tiu sistemo estas uzataj multaj signoj kiuj ofte elfalas, ofte konfuziĝas la silaboj.

En sia raporto al la Ŝtata Konsilantaro, la Komitato por Reformo de la Ĉina Skribolingvo, la Komisiono de Ĉinaj Loknomoj kaj aliaj diras: En 1958 Ĉefministro Zhou Enlai montris, ke la

han-lingva fonetika alfabeto povas esti uzata en transskribo de ĉinaj propraj nomoj en fremdlingvaj dokumentoj, libroj kaj gazetoj. Dum multaj jaroj, koncernaj institucioj faris multe da preparaj laboroj por tion efektiviĝi. Ekzemple, oni kompilis kaj eldonis "Maparon de la Provincoj de la Ĉina Popola Respubliko" kun loknomoj skribitaj per han-lingvaj fonetikaj literoj. La meteologia branĉo de nia lando jam komencis uzi la han-lingvaj fonetikajn literojn por skribi niajn meteologiajn staciojn en raportoj al la Internacia Meteologia Federacio.

La raporto diras: En aŭgusto de 1977, la Tria Kongreso por Normigo de Propraj Nomoj okazigita de la Unuiĝintaj Nacioj en Ateno aprobis la proponon de nia delegacio pri transskribo de niaj propraj nomoj per la han-lingva fonetika alfabeto. Post pli-ol-unu-jara preparado, uzado de tiu sistemo jam povas esti komencita. Tamen iuj unuoj, kiuj havas malfacilojn, povas apliki la novan transskriban sistemon iom poste. En la kongreso nia lando ankaŭ konsentis allasi transiran periodon dum kiu aliaj landoj povas uzi samtempe malnovajn transskribajn sistemojn, kaj eksterlandaj dokumentoj, telegramoj, biletoj kaj identigiloj ilin aplikantaj ankoraŭ estos akceptataj de nia lando.

En sia "Klarigo pri Praktika Uzado" aldonita al la raporto, la Komitato por Reformo de la Ĉina Skribolingvo kaj la Ĉina Loknoma Komisiono donis konkretajn instrukciojn. Ekzemple, en fremdaj lingvoj la ĉinaj propraj nomoj principe devas esti transskribitaj per la han-lingvaj fonetikaj literoj kaj la komunaj nomoj (ekzemple provinco, municipo, aŭtonoma regiono, rivero, lago, maro kaj similaj) devas esti tradukitaj laŭ la senco. La propraj nomoj en literaturaj verkoj, mapoj por turismo kaj aliaj eldonaĵoj, entenantaj rimarkindan signifon, iafoje povas esti

(Daŭrigo sur p.30)

Klarigo pri la nova sistemo uzata por transskribo de ĉinaj propraj nomoj

Ekde tiu ĉi numero ni uzas la han-lingvan fonetikan alfabeton por transskribi la ĉinajn proprajn nomojn neesperantigitajn. Por ke la legantoj sciu la prezentatan sonon kaj la respondan formon en la Esperanta transskriba sistemo ĝis nun uzata en nia gazeto, ni donas la suban komparan tabelon, en kies unua kolono staras la han-lingvaj fonetikaj literoj (H.F.L.), en la dua la respondaj internaciaj fonetikaj literoj (I.F.L.) kaj en la tria la respondaj Esperantaj literoj (Esperanto) en la ĝis nun uzata sistemo en nia gazeto:

Kompara Tabelo de Interrespondaj Literoj

H. F. A.	I. F. A.	Esperanto	H. F. L.	I. F. L.	Esperanto
b	p	b	ai	ai	aj
p	p'	p	ao	au	aŭ
m	m	m	an	an	an
f	f	f	ang	aŋ	ang
d	t	t	ou	ou	oŭ
t	t'	t	ong	uŋ	ong
n	n	n	er	er	er
l	l	l	ei	ei	ej
g	k	g	en	en	en
j	te	g antaŭ i, ju	eng	eŋ	eng
k	k'	k	ia, ya	ia	ia, ja
q	te'	k antaŭ i, ju	ie, ye	ie	ie, je
h	x	h	iao, yao	iau	iaŭ, jaŭ
x	e	h antaŭ i, ju	iou, you, iu	iou	iu, joŭ
zh	ts	ĝ	ian, yan	ian	ian, jan
ch	ts'	ĉ	iang, yang	iaŋ	iang, jang
sh	s	ŝ	in, yin	in	in, jin
r antaŭ vokalo	z	j	ing, ying	iŋ	ing, jing
z	ts	z	iong, yong	yoŋ	iong, jong
c	ts'	c	ua, wa	ua	ua, va
s	s	s	uo, wo	uo	uo, vo
a	a	a	uai, wai	uai	uaj, vaj
o	o	o	uei, ui, wei	uei	uj, vej
e	e	e	uan, wan	uan	uan, van
ê	ε	e	uen, un, wen	uən	un, ven
i, yi	i	i, ji	uang, wang	uaŋ	uang, vang
i post z, c, s	ɿ	i	ueng, weng	uəŋ	ueng, veng
i post zh, ch, sh, r	ɿ	i	üe, ue post j, q, x	yε	jue
u, wu	u	u, vu	üan, uan post j, q, x	yan	juan
ü, u post j, q, x	y	ju	ün, un post j, q, x	yn	jun

Verda Majo en Ĉinio

(Daŭrigo)

III

Vintre de 1937, Ŝanhajo falis kaj estis tretita de la japanaj imperiistoj per feraj kalkanumoj.

En la 27-a de novembro, Verda Majo kaj ŝia edzo, helpate de ĉinaj esperantistoj, fuĝis de Ŝanhajo al Hongkong kune kun aliaj fuĝantoj,



La geedzoj Liu Jen kaj Verda Majo en ĉirkaŭurbo de Chongqing (Ĉongking)

kaj volis iri tra Hongkong kaj Kantono al Hankoŭ, por rekte sin ĵeti en la rezistan batalon.

En Kantono, Verda Majo partoprenis kune kun la lokaj ĉinaj esperantistoj en laboro de la Kantona Internacia Asocio, kies tasko estis fari internacian propagandon.


Apenaŭ ŝi faris iom da Esperanta laboro en Kantono, ŝi estis jam persekutata de kuomintagaj detektivoj kaj ricevis ordonon tuj forlasi tiun urbon. La afero okazis du semajnojn post la fondiĝo de la asocio. Sed la decido de Verda Majo pri rezista batalo estis neniel ŝancebla. Kvankam tiam troviĝis multaj japaninoj-edzinoj, kiuj forlasis sian ĉinan edzon por atendi finiĝon de la milito en Hongkong, tamen Majo ne volis tian vivon. “Mi ne volas senfare atendi la finiĝon de l’ milito kiel tiuj fratinoj. Mi ne volas iri ilian vojon. Mi esperis kaj kredis, ke ni iel kaj iam nepre povos venki la malfacilojn.” Fine, dank’ al helpoj de pluraj progresemluloj, precipe de Guo Moĵuo, ŝi atingis Hankoŭ en julio de 1938.

En Hankoŭ ŝi laboris kiel parolistino de radiostacio por disaŭdigado al Japanio. Per tio ŝi rekte partoprenis en la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo.

Poste Verda Majo skribis en la Postskribo en sia verko “En Ĉinio Batalanta”: “Tiu ĉi periodo apenaŭ entenas 3 monatojn, ... Tre mallonga,

La signoj de la sistemo ĝis nun uzata en nia gazeto ne povas fidele prezenti sone la respondajn hanlingvaj fonetikajn literojn, do tiuj kiuj deziras scii la elparolon de la hanlingvaj literoj devas sin helpi per la donitaj internaciaj fonetikaj signoj en la tabelo.

Por ke niaj malnovaj legantoj vidu, pri kiuj lokoj aŭ personoj temas la transskribitaj nomoj, ni donos parenteze la ĝis nun uzitan formon de iuj gravaj nomoj kiel ekzemple: Beijing (Pekino), Ŝanhaj (Ŝanhajo), Changĵiang (Jangzi-rivero), Huanghe (la Flava Rivero), Sun Zhongshan (Sun Yatsen) kaj Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek).



Kamarado Guo Moruo (Guo Mo-juo) inter esperantistoj kaj kulturaj laborantoj de Chongqing (La kvina de maldekstre estas Liu Jen)

sed kiel ekscita, vigla kaj streĉa ĝi estis!... La rezistmilito ja estis tutnacia en la ver-vera senco de l' vorto."

La japanlingva disaŭdigo fare de Verda Majo kvazaŭ akra glavo rekte pikis la koron de la japanaj militaristoj. Ili ĉie klopodis por ekscii kiu estis tiu parolistino tiel flue parolanta japanlingve? Nur post la falo de Hankoŭ, ili eksciis, ke ŝi estis Hasegaŭa Teru. La japanaj militaristoj ne nur riproĉis nian Majon kiel "naciperfidulon", sed ankaŭ punis ŝian patron devigante ke li memmortigu per ventrotranĉo.

Japana verkistino Saŭaĉi Hisae faris komenton, dirante: "La nomo de 'naciperfidulo' per kiu oni riproĉis Teru, estas medalo de neniu el la japanoj akirebla."

Ŝi amis Japanion, amis ankaŭ Ĉinion. En sia artikolo "Amo kaj Malamo", ŝi skribis: "Mi amas Japanion, ĉar ĝi estas mia patrio, kie vivas miaj gepatroj, gefratoj, geparencoj kaj geamikoj—kun multe da karmemoroj." "Mi amas Ĉinion, ĉar ĝi estas mia nova hejmlando, kie min ĉirkaŭas multaj bonkoraj kaj laboremaj kamaradoj." "Mi malamas, per mia tuto malamegas la hommurdon inter la du popoloj. Kiu el ili vikti-

mus, mi droniĝus en neelsaveblan malĝojon." Kaj en la fino de la artikolo ŝi alvokis per plena voĉo al japanaj soldatoj: "Ne misverŝu la sangon, via malamiko ne estas ĉi tie trans la maro!"

IV.

Post falo de Vuhan, en la 27-a de oktobro, 1938, Verda Majo venis al Ĉongking tra Gujlin. Ĉongking estas fame konata nebula urbo. En iu el siaj artikoloj Verda Majo skribis: "Ĉu Ĉongking ne havas la sunon?" "La sunon ni havas, nur ĝin kaŝis la nebulo."


Ĉongking tiam efektive estis kovrita de nebulo pro tio, ke Ĉiang Kajŝek praktikis politikon negative fari rezistmiliton dum aktive batali kontraŭ la Kompartio kaj la popolo. Sed la popolanoj kaj armeanoj de la vasta liberigita regiono aktive faris rezistan batalon terurante la japanajn diablojn kaj faris grandajn meritojn. La Komunista Partio de Ĉinio elmetis la sloganon "persisti en rezista batalo, oponi kontraŭ kapitulaco; persisti en unuiĝo, oponi kontraŭ splitiĝo; persisti en progreso, oponi kontraŭ regreso", gvidis la tutlandan popolon al batalo kontraŭ la japana invado kaj per tio peze batis la

reakcian ambicion de Ĉiang Kajšek. K-do Ĝoŭ Enlaj venis al Ĉongking kiel reprezentanto de CK de KPC por fari pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la kuomintanga reakciularo.


Spertinte kelkjaran batalan vivon en Ĉinio, Verda Majo akiris pli profundan konon pri la Komunista Partio de Ĉinio kaj la kuomintanga reakciularo. Ŝi skribis: “Dum la lastaj jaroj en la ekstera mondo okazis grandaj ŝanĝoj direktataj al la lumo, tamen tiu ĉi nebula urbo ĉiam restas nebula. Sub la nebulo mi vidis multe da tio kio ne devus havi lokon en batalanta Ĉinio.” Tio jam klare esprimis ŝian malkontenton pri la reakcia registaro de Kuomintango kaj Ĉiang Kajšek. En sia verko “En Ĉinio Batalanta” komencita en Ĉongking ŝi planis dividi sian sepjaran vivon en Ĉinio en tri partojn: La unua parto temas pri la periodo de ŝia alveno al Ŝanhajo ĝis ŝia forpelo al Hongkong; la dua pri la periodo en Hankoŭ kaj la tria pri la periodo en Ĉongking. Tamen ŝi skribis nur la unuan parton sed ne la ceterajn pro diversaj kaŭzoj. Tiu ĉi broŝuro estis eldonita de la Koresponda Esperanto-Lernejo de Ĉongking, en 1945, kaj represita de la Japana Esperanta Librokooperativo en decembro, 1954.

En la 9-a de decembro, 1939, Prezidanto Maŭ skribis por la “Jan-anaj Esperantistoj”: “Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.” Tio klare montris al la ĉinaj esperantistoj la direkton de antaŭenmarŝo.

Ĉirkaŭ tiu periodo, kunlaborante kun la Ĉongking-a esperanta gazeto “Heroldo de Ĉinio”, ŝi verkis multajn batalajn artikolojn en Esperanto, ekz., “Al la Tutmonda Esperantistaro”, “Du Pomoj Perditaj” (poemo), “En la Maja Ĉefurbo”, “Tempo de Anstataŭaĵoj — Ĝenroj pri la Milittempa Japanio”, “Venas la Vintro, Ne foras do 1’ Printemp’ — Dediĉe al Kamarado Mangada”, “Profilo de Japanaj Studentoj” kaj “Batalante Ili Iras Antaŭen”, kaj aperigis iujn tradukojn en Esperanto. Tiuj verkoj inkluzive de la supre menciitaj poste estis kolektitaj en iu broŝuro “Flustr’ el Uragano”. Ŝia edzo Liu Jen skribis por ĝi antaŭparolon “Banala Memoraĵo”. En 1941, la redakcio de “Heroldo de Ĉinio” en Ĉongking eldonis la broŝuron kaj en 1975 la japana eldonejo “Pirato” ĝin reprenis kun tri aldonitaj artikoloj. Kaj ankaŭ ŝia Esperanta



Poemo verkita kaj manskribita de Guo Moruo por Verda Majo




“Flustr’ el Uragano” verkita de Verda Majo

traduko “Vivantaj Soldatoj” de Išikaŭa Tacuzo estis eldonita de la redakcio de “Heroldo de Ĉinio”. Kaj tiam ŝia nomo — Verda Majo — plurfoje aperis en Hinhua-Tagjurnalo eldonita de la Komunista Partio de Ĉinio en Ĉongking.

En tiuj verkoj Verda Majo plu malkaŝis senkompatate per akra plumo la krimagojn kiujn faris la japanaj militaristoj dum sia agresado al Ĉinio, kaj esperis ke formiĝos vasta unueca fronto de la mondaj popolanoj kaj esperantistoj en solidareco por oponi kontraŭ tiu maljusta milito. Ŝi skribis: “Nia malamiko estas nur unu: — faŝistoj.” Ŝi opiniis ke Esperanto estas lingvo progresiva kaj revolucia, kiun manipuli oni neniel devas permesi al la agentoj de faŝistoj, ĉar “Nia Esperanto jam fariĝis lingvo de Romain Rollan, lingvo de Gorkij, kaj lingvo de Marks”. Kaj samtempe ĝi estas ankaŭ internacia armilo, ĉar “niaj k-doĵ estas ĉie en la mondo, kaj nia voĉo povas atingi ajnan anguleton de l’ terglobo.”

La artikolo “Batalante Ili Iras Antaŭen” estis skribita en marto de 1940, kiu prikantas la virinojn en la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio, la gerilanojn en diversaj liberigitaj regionoj kaj la studentojn de la Jan-ana Virina Universitato. Ŝi skribis: “Ankoraŭ junaj ili estas kaj dornas la vojo. Sed ne en malproksimo brilas la lumo.” Per tio ĝi esprimis ŝian sopiron al la liberigita regiono. Kaj ŝi finis sian artikolon per jenaj vortoj de Prezidanto Maŭ: “Kiam leviĝos tutĉinia virinaro, ĝuste tiam venkos nia rezistmilito.”



“En Ĉinio Batalanta” verkita de Vera Majo

La streĉa batalo kaj malfacila vivo fine malsanigis Verdajn Majojn. Ŝi suferis ftizon, kaj la “du ruĝaj pomoj” fine perdiĝis de sur ŝiaj vangoj. Sed ŝi estis tre optimisma kaj humure diris en sia letero al sia patrino: “Pardonon, Panjo, mi jam formanĝis la du ruĝajn pomojn donitajn de vi al mi.” Kaj pri tiu temo ŝi verkis, en sia malsanlito, longan poemon titolitan “Du Pomoj Perditaj”, en kiu ŝi esprimis sian decidon batali ĝisfine por la tutmonda pacama popolo.

*“Vidu, kara patrin’ mia,
Ili estas nur du el sennombraj,
Kiuj falis antaŭtempe,
Por ke maturu ruĝaj pomoj eterne-bele
En la kontinent’, en Japani’,
Kaj en la vasta tuta mond’.”*

Tiu ĉi poemo estis vaste cirkulita kaj eĉ uzita kiel instrua materialo de mezlernejo.

Tia optimismo, tia memfido pri venko same prezentiĝis en ŝia artikolo “Venas la Vintro, Ne Foras do l’ Printemp’” skribita en malsanlito en decembro de 1939. Ŝi skribis: “Jam pli ol semajnon sunradioj ne vizitas mian malsanliton. Sed eĉ peceton da malgajo aŭ malespero mi ne sentas. Kontraŭe, ardiĝo de nova batalemo skuas mian febrethan korpon. — Kun plena ĝojo kaj fiero mi deklaras, ke la ĉina popolo neniam sklaviĝos antaŭ perforto kaj ĉinaj esperantistoj neniel perfidos la brilan stelon sur la brusto.”

Tiam Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ĵen laboris en la “Komitato de Kultura Laboro” gvidata de

Guo Mojuo. Ŝi laboris diligente kaj pene kaj sintenis afable kaj bonkore. Pri tio ankoraŭ bone memoras tiuj kiuj kontaktis iam kun ŝi. Kaj samtempe ili ambaŭ estis varmkoraj legantoj kaj subtenantoj de Hinhua-Tagjurnalo kaj la gazeto "Amaso" de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj ofte partoprenis en politikaj kunvenoj en kiuj oni prezentis la politikojn de la Komunista Partio de Ĉinio kaj pri la vivo en la Liberiĝita regiono. K-do Guo Mojuo tre zorgis kaj ofte

kuraĝigis ŝin, kaj skribis donace al ŝi poemon sur la ruĝa silkaĵo de ŝi portita de Japanio:

*Mallumo regadas sur vasta kamparo sen-
lima,
Stelaro belegas sur tuta l' obskura ĉielo,
Rebrilo de neĝo montriĝas ja tro malpro-
ksima,
Prefere ni legas sub lampo kun ĉarma lum-
helo.*

(Daŭrigota)

Juanjuan kaj Ŝia Filino

de XIAO MINQIU

LA Beijing-a (Pekina) Zoologia Ĝardeno unuafoje sukcesigis generadon de pando per arta impregnado. La nove naskita pandido Yuanjing sane kreskas kaj akceptos vizitantojn ĉirkaŭ la unua de majo ĉijare.

La granda pando estas rara animalo sole vivanta en Ĉinio. Ĝi estas diketa, milda kaj aminda. Iufoje ĝi staras sur la dupostaj piedoj kun rektigita talio kvazaŭ en dancado kaj aliafoje ĝi sin amuzas rulante sur tero. Ĝiaj petolemaj movoj ofte vekas ridojn ĉe la vizitantoj. En Ĉinio troviĝas multaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj kun bildo de pandoj. Iu fame konata speco de cigaredo de Ĉinio portas la markon de pando. La granda pando servas ankaŭ kiel valora donaco al aliaj landoj, kaj pro tio ĝi estas nomata "amika sendito" de Ĉinio.

La granda pando estas unu el la raraj animaloj en la mondo. Tiaj bestoj vivas nur en arbaroj de iuj lokoj de la provincoj Sichuan, Gansu kaj Shaanxi de Ĉinio. Pro tio oni tre zorgas pri ilia generado. La pandino Juanjuan post arta impregnado, bredata en la Beijing-a Zoologia Ĝardeno, naskis du idojn en la oka de septembro, 1978, kaj unu el ili nun bone vivas. Antaŭe, la zoologiaj ĝardenoj de Moskvo, Londono kaj Tokio faris similajn eksperimentadojn, sed malsukcesis.

Kial tiom malmulte da grandaj pandoj vivas en la mondo? Laŭ esplorado de zoologoj, en la plejstoceno antaŭ 5-600,000 jaroj tiaj pandoj vivis pli vaste ol nun. Poste, ili ne povis adaptiĝi al la medio jam ŝanĝiĝinta kaj ilia nombro malpliĝis multe, ĉar multaj bambuaroj manĝataj de pandoj estis detruitaj, post kiam la homoj senĉese plivastigis sian aktivan sferon, kaj samtempe la atakaj organoj de pandoj degeneris post longtempa manĝo de bambuoj. En la lokoj de nia lando, taŭgaj por la vivo de la pandoj, troviĝas montoj pli ol 2,000 metrojn altaj kun primitivaj arbaroj kaj bambuaroj. Tio ebligis al ili postvivi en la lokoj. Ili ŝatas kvietan vivon kaj purecon. Krom en la floranta printempo — la seksarda periodo de pandoj, la inaj kaj viraj pandoj neniam pariĝas. La bredataj pandoj plie malhavas seksardon, tial tre malfacila estas generado de pandoj. Ekde la jaro 1955 la Beijing-a Zoologia Ĝardeno komencis bredi grandajn pandojn, sed unuafoje sukcesis en spontanea generado de tia besto en 1963. Dum la 14 jaroj de post tiu jaro, la pandinoj de la ĝardeno naskis 16 idojn en 10 akuŝoj kaj vivis nur 7 idoj. Ĝis nun ankoraŭ ne troviĝas ĝemeloj kiuj samtempe vivas.

Post la Tutlanda Scienca Konferenco okazinta en marto de la pasinta jaro, la Beijing-a Zoologia

Ĝardeno fondis specialan sciencesploran grupon por fari eksperimentadon pri generado de pandoj per arta impregnado. Oni unue faris tian eksperimentadon al ruĝa vulpo kaj bruna urso kaj trovis taŭgan metodon de arta impregnado. Post la unuapaŝa sukceso, en aprilo de 1978 oni anestezis virpandon en seksarda periodo kaj elprenis spermatozoon el ĝi per elektra ekscitado. Poste oni faris artan impregnadon al kvar pandinoj, el kiuj nur Juanjuan estis gravedigita.

Post 100 tagoj la pandino Juanjuan perdis apetiton kaj prezentis fenomenon de gravediĝo. Sciencistoj kaj bredistoj ĝoje kaj atente observis ŝin. Post pliaj 38 tagoj ŝi akuŝis idon tutkorpe blankan, ĝin purigis lekante kaj premis en sia sino. La etulo estas ina kaj malgranda kiel blanka muso. Post duona horo ŝi naskis alian idon viran. La du idoj pezis po ĉ. 125 gramojn. Tiam la patrino tute raviĝis de la filino, kaj ne povis samtempe zorgi sian filon. Pro tio oni devis flegi ĝin anstataŭ ŝi. Sed bedaŭrinde ĝi vivis nur 64 horojn.

Ekde la jaro 1972 la pandino akuŝis trifoje, sed la tri idoj de la unuaj du akuŝoj mortis. Ŝi ĉiamaniere flegis sian filinon. Neniu povas imagi, ke ŝi antaŭe estis malica "knabino". Kiam oni kaptis ŝin, ŝi vundis ses kaptantojn. Sed nun ŝi jam fariĝis milda kaj afabla patrino! La nove naskita ido havis malgrandan korpon kaj maldensan hararon kaj timis malvarmon. Ŝi ĉiam firme premis la idon al sia haroza sino kaj senĉese blovis spirajojn por varmigi ĝin. Ŝi ĉiam ĉirkaŭprenis ĝin eĉ dum manĝado kaj dormado. Iufoje, kiam ŝi dronis en profunda dormado, la ido falis el ŝia sino. Aŭdinte la bruon, ŝi tuj

Yuanjing dormas en la sino de sia patrino.

Malgranda Yuanjing



vekigis kaj ĝin reprenis rapide. Ja tre pene estas por Juanjuan flegadi la filinon.

La sciencesplorantoj kaj bredistoj de la ĝardeno tagnokte deĵoris por observi kaj noti ilian vivon post la akuŝo de la pandino. Samtempe oni donis al ŝi lakton, ovon, kalcian tablojdon, vitaminon kaj moruoleon. La pandino tre ŝatis manĝi freŝajn bambufoliojn. Por ke ŝi povu manĝi ĉirkaŭprenante sian filinon, bredisto faskigis kaj donis al ŝi bambufoliojn.

En la aĝo de du kaj duona monatoj la ido jam povis mem petoli. Ĝi pli kaj pli similas al sia patrino kaj estas tre aminda. Ĉirkaŭ ĝiaj okuloj jam aperis du nigraj cirkloj, kaj ĝia hararo ĉe la talio, la kvar piedetoj kaj orelpintoj eknigriĝas iom post iom.

Bredistoj diris, ke pandido povas esti demamigita kaj libere agadi, kiam ĝi estas 6-monata.

Nun la Beijing-a Zoologia Ĝardeno flegas ĝin tre zorgeme kaj ankoraŭ ne permesas al vizitantoj rigardi ĝin. Kiam ĝi kreskos pli fortika post demamigo, ĝi povos prezentiĝi antaŭ la vizitantoj.



La Loko de Amo en la Vivo

I

Apenaŭ finiĝis la matena deĵoro, kiam Majstro Wei, la estro de nia laborejo, vokis min al si. Mi do iris kun li en la angulon de la laborejo apartigitan per tavoltabuloj servantan kiel laborejan oficejon.

“Ho vi, ho nia bravulino Meng Xiaoyu!” Mal-espero kaj zorgo vidiĝis en la negrandaj tamen brilaj okuloj sur la kvadrata vizaĝo de Majstro Wei kun raspa haŭto kaj severaj trajtoj. Svingante la montrofingron de sia kaloza dekstra mano, li murmuris: “Mi ja ne atendis, ke ankaŭ vi ekokupiĝas pri amato. . . . Ja ankoraŭ juna vi estas, kial hasti? Kiam vi atingos la aĝon de Yamei, mi rekomendos al vi plej bonan — vi povos simple diri al mi, kian vi volas, kiam estos la tempo. Sed nun vi. . . .”

Mi pene ŝajnis min netuŝita kaj diris: “Ja kion vi diras — tute senkaŭze! . . .”

Majstro Wei malrapide balancis sian kapon, suspiris kaj poste elprenis falditan koverton el la brusta poŝo de sia bluzo kaj ĝin donis al mi dirante: “Jen letero alportita de pordisto Maljuna He kune kun la ĵurnaloj — la junulo eĉ ne kredas la leterportistojn kaj mem portis ĝin al la pordista ĉambro!”

Mi haste transprenis la firme glufermitan koverton. Kiam mi ekvidis la karan kaj bone konatan manskribajon “Al Meng Xiaoyu”, mi sentis kvazaŭ motoreto ekfunkcius en mia brusto kaj varmon disradiis miaj vangoj. Mi malfermis la koverton kaj vidis sur paperslipo jenan mallongan noton: “Mi aĉetis biletojn por la filmo ‘Sentineloj sub Neonlampoj’ ludota je kvarono post la tria en Dahua-kinejo. Nepre ne malfruiĝu.” Instinkte mi ekrigardis mian brakhorloĝon:

Jam ok minutoj post la 2-a! Instinkte mi ekturis min kaj jam estis ekpaŝonta eksteren, kiam aŭdiĝis post mia dorso severa tusaverto de Majstro Wei. Mi do returnis min kaj sincere diris al li: “Estu trankvila, Majstro Wei, — morgaŭ mi diros al vi la tutan historion!”

Mi haste eniris la tualetan ĉambron. Ĉiuj jam foriris escepte de Yamei, kiu zorge kombadis la hararon antaŭ spegulo. Ŝi jam preskaŭ 28-jara, estas la plej aĝa el la ok gejunuloj en nia laborejo. Ŝi estas malkaŝe klopodanta por akiri amaton, kaj ĉiuj opinias tion nature aprobinda, inkluzive de Majstro Wei, kiu estis severa al ŝi antaŭ kelkaj jaroj, tamen konatigis al ŝi junulon antaŭ duona jaro. Je la unua intervidiĝo, ŝi tre kontentis pri tiu junulo, sed poste kiam ŝi informiĝis ke lia patrino suferas de kronika malsano kaj multaj estas liaj gefratoj, ŝi “estingis” la amon. Nun ŝi fine sukcesis trovi iun “plej kontentigan”, kies superecojn eĉ mi jam povas nun flue reciti: “Universitata diplomito, sen bezono helpi familianon per sia salajro tamen kun centoj da juanoj deponitaj en banko; lertulo en ĉarpentado jam pretiginta ŝrankon, sofojn kaj skribotablon unu post alia por sia edziĝo; la institucio, kie li laboras, havas loĝĉambrojn; kun kuzino laboranta en ĥoro de ensemblo, do povanta havigi oportunon ĝui spektaklojn. . . .”

Mi rapide ŝanĝis miajn vestojn kaj ŝovis min al la spegulo por ordigi la harojn ĉe la tempioj. Tiam Yamei subite kaptis min, prenis kun brila mieno felpan koltukon el la mansako, volvis per ĝi la kapon kaj tiris min per mia brako al la spegulo sen zorgo pri mia konsento, dirante kun memcerteco: “Nu? Ĝi akordas kun mia surtuto, ĉu ne?” Mi tute ne havis tempon por apreci ŝian tualeton kaj murmuris kapjesante: “O, jes.”



Kiam mi fine liberiĝis de Yamei dronanta en feliĉaj sentoj kaj ascendis en trolebuson al Dahua-kinejo, jam estis 25 minutoj post la dua.

II

Antaŭ oktobro de 1976, la “kvarpersona bando” malbonigis sociajn morojn. Iuj junuloj en aĝoj similaj al la mia enbusiĝis ne laŭvice, sed konkure por kapti sidlokon kaj tute senĝene restis sidanta, kiam stariĝis apude tremanta blankhara avino aŭ virino kun infano en siaj brakoj. Iutage en aŭgusto de 1976, mi veturis en trolebuso post la deĵoro kaj rimarkis sur seĝeto junulon kun malgranda liphararo, apud kiu staris avo kun lacaj trajtoj, kiu pene sin kroĉis permane al la pendringo, kvazaŭ li povus fali ĉiumomente. La Malgranda Lipharulo de tempo al tempo rigardis al la maljunulo kun evidenta abomeno al liaj ne tre puraj vestoj, kiuj preskaŭ tuŝis lian

neĝblankan ĉemizon. Ne nur mi, sed ankaŭ ĉiuj pasaĝeroj en la ĉirkaŭaĵo ne plu povis tion toleri. Kiam mi estis hezitanta, ĉu mi kuraĝe diru al la Malgranda Lipharulo, ke li stariĝu, subite aŭdiĝis nehasta sed firma voĉo: “Kamarado, bonvolu cedi la sidlokon al la avo!”

Mi levis la okulojn kaj rimarkis, ke ankaŭ la ordonanto estas junulo. Li portis grizajn vestojn, liaj ŝultroj estis larĝaj, lia frunto estis alta kaj liaj okuloj forte brilis kiel boriloj.

La Malgranda Lipharulo kun krucigitaj brakoj antaŭ la brusto mienis malestime: “Mi ne cedos. Ja ne mi sola sidas, do cedu kiu volas.”

Tiam la maljunulo ekparolis: “Lasu, mi povas stari!”

Tamen iu grizhara virino stariĝis de sia sidloko dirante: “Sidiĝu ĉi tie!”

La maljunulo denove suspiris kaj sidiĝis. Ŝajne tiel finiĝis la afero.

Tamen la junulo, kiu donis ordonon, ankoraŭ rigardadis la Malgrandan Lipharulon kun borantaj okuloj kaj diris senemocie: “Ĉu vi povas pravigi vian sintenon — kial vi ne cedas sidlokon al la aĝulo?”

La Malgranda Lipharulo tuj rektigis sian trunkon kaj ekkriis barbare: “Kial mi cedu sidlokon al li? Se vi volus sidi, voku min per ‘fracjo’, sed ne ŝajnigu vin bonulo! . . .”

Kvankam mi vidis iujn malraciajn disputemulojn, tamen unuafoje mi renkontis tiel “altkvalitan” kiel la Malgrandan Lipharulon. Eble ĉiuj ĉirkaŭaj pasaĝeroj same tiel pensis kiel mi. Ĉiuj direktis al li indignan rigardon kaj iu eĉ aŭdigis sian riproĉon: “Kiel absurde!”. . .

Mi fiksrigardadis la junulon, kiu donis al mi bonan impreson. Li eksvingis siajn brovojn kaj diris al la Malgranda Lipharulo klare akcentante ĉiun vorton: “Venos la tago, kiam vi ekpentos!”

La trolebuso venis al haltejo kaj li descendis akompanate de admiraj rigardoj de la pasaĝeroj. Mi rigardadis lian dorsan figuron tra fenestro de la veturilo, ĝis li malaperis. Tiuvespere, mi notis en mia taglibro mian fortan impreson pri li.

Poste mi rimarkis, ke li estas ofte renkontata en trolebuso, kiam mi havas mezan deĵoron. Ĉiufoje, kiam li ascendis trolebuson, li starigis sin ĉe ĝia fina angulo, elpoŝigis fremdlingvajn vortokartojn kaj komencis parkeradi. Kie li laboras? Eble li estas teknikisto?

Iutage faladis subtila pluvo kaj en la trolebuso ne estis tiel multaj pasaĝeroj. Pluraj sidlokoj restis neokupataj. La biletistino vokis al mi kaj li — ĉar nur ni ambaŭ staris ĉe la fino: “Antaŭen kaj sidiĝu, gekamaradoj.”

Mi danke rifuzis kun rideto. Ankaŭ li ne volis sidiĝi.

La biletistino, serena dikulino, rigardis min kaj lin malkaŝeme kaj diris kun rideto: “Paro de stranguloj!”

Nur tiam mi kaj li unuafoje rigardis unu al la alia. Li rigardis min ridetante kun okuloj

kvazaŭ demandantaj: “Ĉu ankaŭ vi havas la kutimon ne preni sidlokon en trolebuso?” Mi sentis, kvazaŭ formiko rampus ĉe la radikoj de la oreloj kaj haste mallevis la kapon.

Depost tio, ĉiufoje kiam li vidis min en trolebuso, li ekridetis apenaŭ rimarkeble kaj poste komencis legi fremdlingvan libron, ankoraŭ sin apogante ĉe angulo de la fino de la veturilo. Oni diras, ke vera amo povas komenciĝi je tute hazarda okazo. Post pripenso, mi konstatis, ke en hazardaĵo ofte enkorpiĝas nepreco. . . Iun matenon en la meza tagdeko de aprilo, mi iris al Xinhua-librejo por aĉeti nove eldonitan libron. Kiam mi venis al la librejo, longa vico de klientoj jam atendis tie. Mi pentis, ke mi ne venis pli frue. En tiu momento, mi rimarkis lin la 26-a en la vico, kaj ankaŭ li rimarkis min. Kompreneble, ni ekridetis samtempe.

“Jen, mi malfruas. . .” Tio estis la unuaj vortoj kiujn mi diris al li.

“Ne gravas, mi povas cedi al vi ekzempleron,” li diris senhezite.

Tiamaniere, ni “oficiale interkonatiĝis”. Kiam mi kaj li eliris el la librejo kun po unu nova libro pakita en roza papero, ni ekinterparolis pretervole. Ni kune promenis senkonscie ĝis Chang’an-strato. Kiam mi informiĝis, ke ankaŭ li ripozas antaŭtagmeze, neeldireblan ĝojon mi eksentis. Ni demandis unu la alian: Ĉu vi venis en la tago por adiaŭi la ĉerkoveturilon de Ĉefministro Zhou? Kie vi staris? Ĉu vi sukcesis aĉeti la poemaron memorigan pri Ĉefministro Zhou? Kiun pecon el ĝi vi plej ŝatas? Kiam vi ekinformiĝis pri frakaso de la “kvarpersona bando”? . . . Ho, tiel multe da komunaj sentoj kaj pensoj mi kaj li havis, ke mi tre volis interparoladi kun li senfine. Sed kiam ni proksimiĝis al la aŭtobusa haltejo ĉe Dongdan, li haltis kaj simple adiaŭis al mi dirante: “Mi devas kapti la buson. Mi havas ion por fari.”

Mi ne memoras kion tiam mi diris, eble “dankon pro via helpo en libroaĉeto”, aŭ “bone, mi tre ĝojas renkontiĝi kun vi”. Unuvorte, kiam lia aŭtobuso forveturis, mi subite sentis tiel bedaŭron kiel serenecon en la koro. Levinte la kapon mi ekvidis, ke en la fono de la blua serena



firmamento, brilis helverde en la printempa suno lanugaj folietoj sur la sukoplenaj poplaj branĉoj, de kiuj jam falis ĉiuj purpuraj florspikoj. . . Mi konsciis, ke fine mian koron ekatakis la sento atendita kaj mistera, kiun oni ne povas komuniki eĉ al la plej intima persono.

En la sekvanta tago, kiam ni denove renkontiĝis en trolebuso survoje al deĵoro, nature ni komencis interparoli krom interŝanĝo de ridetoj.

“Ĉu ankaŭ vi lernas fremdan lingvon?” Li elprenis fremdlingvan libron kaj min demandis intime.

“Mi aŭskultadas la radiodissendan kurson de la japana lingvo — mia onklo estas japanlingva interpretisto kaj povas min helpi. Sed nun plej multe da tempo mi uzas por literaturo. . . mi

ŝatas legi bonajn novelojn ĉinajn kaj fremdlandajn de la moderna aŭ antikva tempo.”

“Ĉu vi ankaŭ mem verkas?”

Mi kapjesis embarrase.

“Ankaŭ mi ŝatas literaturon.” Ŝajne li divenis mian hontemon kaj diris sincere: “Sed nun, ŝajnas al mi, ke ne estas multaj bonaj noveloj kaj romanoj, precipe noveloj. . . Mi ŝatas verkojn de Ĉeĥov, Maupassant kaj O. Henry, kaj inter la ĉinaj verkoj “Biografia Noto pri Li Shuangshuang” de Li Zhun, “Printempa Nokto” de Wang Wenshi kaj “Rememoro pri Montregiono” de Sun Li. . . Tiujn verkojn mi volas relegi post iom da tempo. . .”

Mian koron kvazaŭ trakuris varma, klara, murmuranta rivereto. Inter la samtempuloj renkontitaj de mi, li estas la sola, kiu sentigis al mi tian intimecon nur per kelkaj vortoj.

Ĉiufoje li descendis la unua de la trolebuso. Antaŭ la descendo en tiu fojo, ni interkonsentis viziti la Beijing-an Bibliotekon en la sekvanta mateno.

Ankaŭ niaj sekvantaj dekelkaj rendevuoj okazis en la Beijing-a Biblioteko. Kaj ĉiufoje je la disiĝo ni decidis la tempon de la sekvanta vizito al la biblioteko. En la komenco, mi rimarkis, ke li estas same akurata kiel mi, ni alvenas al la giĉeto de la deponejo unu tuj post la alia. Sed, foje mi alvenis je kvarono pli frue pro la de mi rapidigita horloĝo. Kiam mi trairis la



S. O. S. sur Mediteraneo

de YOU FANG

POSTTAGMEZE de la 12-a de decembro, 1978, la ŝipo "Hanchuan" de la Oceana Transporta Kompanio de Shanghai veturis sur Mediteraneo okcidenten kontraŭ 7-8-gradaj ventegoj al Londono. Je la dua kaj 20 minutoj posttagmeze, telegrafisto subite ricevis la signalon S.O.S. transsenditan de Radio Aleksandrio. Ŝipestro Bei Hanting kaj politika komisaro Jiang Yuzhi tuj malfermis la marmaron kaj trovis ke la suferanta varŝipo estas du mejlojn dekstre de "Hanchuan". Ili tuj faris mobilizon kaj donis taskon al la tuta ŝipanaro kaj senhezite turnis sian ŝipon al la akcidentejo.

La varŝipo nomata "Espero de Irene" estis de Cipro, kiu trafis akcidenton survoje de la haveno Civitavecchia de Italio ĝis la haveno Damman de Saudi-Arabio. Antaŭ ol sendo de la urĝa signalo, la ŝipanoj jam luktadis kontraŭ ventego kaj ondegoj du tagojn kaj

noktojn. Fine rompiĝis la ŝipfunda valvo, per kiu oni pumpis markvon por malvarmigi la turbinon, kaj la marakvo rapide enŝprucis en kajuton kaj dronigis la turbinon kaj aliajn maŝinojn, tiel ke la energia fonto estis rompita. Tiam, greka ŝipestro T. Lakovos devigite faris decidon forlasi la ŝipon. Kiam la ŝipo "Hanchuan" atingis la lokon, la ŝipo "Espero de Irene" jam klinis sin per angulo de 30 gradoj kun la marsurfaco kaj estis iom post iom dronanta. La 17 ŝipanoj kaj iliaj familianoj el Cipro, Grekio, Sirio, Egiptio, Srilanko kaj Hindio jam suriris savboatojn balancantajn en la ondegoj kaj malpacience atendis savantojn.

Super la decembran Mediteraneon la nokta vualo falis tiel frue ke ĵus batis la kvara posttagmeze, jam venis vespera krepusko. Vento daŭre furiozis, kaj la grandaj ondoj malhelpis la savboaton proksimiĝi

al la ŝipo "Hanchuan". Tiam ŝipestro Bei Hanting, kiu havas historion de marnavigo de pli ol 30 jaroj, ascendis la stirejon, kaj stabiligis la ŝipon. Ĉefmaristo Wang Jingyuan kun kelkaj ŝipanoj sub sia gvido multfoje ĵetis tirkablon por haŭli la savboaton, sed pro la furioza ventego la laboro iris tre malfacile. Post klopodado de pli ol du horoj plejparto de la suferantoj estis savitaj al la ŝipo "Hanchuan". Sed ŝipestro T. Lakovos kiu havas profundan amon al la ŝipo "Espero de Irene" ankoraŭ restis sur la boato veturante ĉirkaŭ la dronanta varŝipo. Nur ĝis la 24 minutoj post la kvina posttagmeze li estis admonite surŝipigita.

La ĉinaj ŝipanoj jam preparis por la suferantoj ĉambrojn kaj litajojn. Eĉ kuiristo Sun Dechun, kiu kuŝis sur lito pro vundo de piedo, revenis al kuirejo por prepari kafon kaj eŭropajn manĝaĵojn spite de doloro.

vojon inter cipresaj heĝoj, mi hazarde ĵetis rigardon tra fendoj en la heĝoj kaj rimarkis, ke transe troviĝis ne nur altaj ŝtonaj ornamaj kolonoj, sed ankaŭ la malpacience atendanta li kun rigardo direktata al la pordego — li ne rimarkis, mi ne scias kial, ke mi jam alvenis antaŭtempe. Mi ne salutis lin kaj kuris en la antaŭĉambregon de la biblioteko kun nepriskribebla sento. Mi pensis, ke li tuj envenos, tamen ne. Nur post 15 minutoj — t.e. ĝuste la tempo interkonsentita — li enpaŝis kvazaŭ ĵus alveninta.

Mi ne malkovris lian sekreton, sed sentis feliĉegon en la koro.

Tiamaniere, ni sopiris denovan intervidiĝon post disiĝo, kaj kiam ni renkontiĝis ni legadis niajn amatajn librojn en la kvietaj legoĉambroj. Ofte tiel okazis, ke ni samtempe levis la rigardon de la libroj kaj ĉerpis neesprimeblan forton el la renkontiĝo de niaj rigardoj kaj poste ni daŭrigis la legadon ankoraŭ pli atente kun klinita kapo. . .

(Daŭrigota)

Du telegrafistoj kiel eble plej rapide komunikis tion al familianoj de la suferantoj. Kuracisto faris korpajn ekzamenojn por la 12 ŝipanoj kaj iliaj familianoj.

Sincera amikeco de la ĉinaj ŝipanoj profunde kortuŝis la suferantajn ŝipanojn. Greka tria maato diris: "Vi savis ne nur min solan, sed an-



EMEI-monto sin trovas en Emei-gubernio ĉe la maldekstra bordo de Dadu-rivero en la sudokcidenta rando de Sichuan-baseno. Ĝi renomiĝas ne nur pro sia majesteco kaj beleco, sed ankaŭ kiel budhisma sanktejo ekde la 16-a jarcento, kie oni komencis konstrui templojn surmonte jam en la 2-a jarcento p. K.

Veturinte de la Emei-gubernia urbo suden ĉ. 6 km., ni venis al la piedo de Emei-monto. En tiu loko troviĝas templo nomata Baoguo, kiu konstruiĝis en Qing (King)-dinastio en la 16-a jarcento. Ĝi havas kvar halojn unu super la alia laŭ deklivo de la monto kaj montriĝas majesta. En ĝiaj kvietaj kortoj troviĝas kiosko, baseno kaj surakva konstruaĵo. La templo kaj aliaj surmontaj antikvaj konstruaĵoj estis plurfoje riparitaj de la ŝtato.

De la templo Baoguo ĝis la montsupro serpentumas zigzaga montvojo de 60 km., kaj du tagoj estas bezonataj por atingi la supron per piedirado. Nun oni konstruis surmontan ŝoseon, tra kiu oni povas veturi ĝis Shuangshuijing, kiu distancas de la montsupro je 11 km., kaj de kie oni povas atingi la montsupron post trihora piedirado.

kaŭ mian akuŝontan edzinon kaj naskotan bebon. Se mia edzino naskos knabon, mi nomos lin 'Hanchuan'." Iu srilanka ŝipano donis sian adreson al ŝipestro Bei Hanting kaj samtempe skribis sur lia notlibro en la angla lingvo: "Mi neniam forgesos vin dum la vivo." Laŭ peto de ŝipestro T. Lakovos, la tuta ŝipanaro de la ŝipo "Espero de

Irene" estis sendita al la insulo Crete de Grekio. En la adiaŭa festeno okazigita de la ŝipo "Hanchuan". S-ro T. Lakovos nedeteneble lamentis brakumante ŝipestron Bei Hanting, povante diri nenion longtempe. Jam estis tempo por adiaŭi, la suferantaj ŝipanoj forte brakumis la ĉinajn kolegojn kaj ne volis foriri.

Emei-monto

de ZHONG WEN

Emei-monto havas tri altajn pintojn, de nordo ĝis sudo, Ora Pinto, Milbudha Pinto kaj Dekmil-budha Pinto. La lasta estas la plej alta je 3,099 metroj super la mara nivelo, la najbara Milbudha Pinto estas iom malpli alta kaj la Ora Pinto altas 3,077 metrojn super la mara nivelo, je 2.5 km. fore de la Dekmilbudha Pinto, kaj tie sin trovas hotelo.

Starante sur la montsupro, oni povas vidi la riverojn Minjiang, Qingyi kaj Dadu en la oriento, kiuj kvazaŭ blankaj rubandoj ornamas la teron, la montojn Daxue kaj Gongga, neĝkovratajn kaj tuŝantajn nubojn en la okcidento, la Grandan kaj Malgrandan Liangshan-montojn loĝatajn de ji-oj en la sudo kaj la vastan kaj verdan Chengdu-ebenaĵon en la nordo.

La sunleviĝo, nubaro kaj aŭreolo estas tri naturaj pejzaĝoj sur la Ora Pinto, inter kiuj la aŭreolo estas plej kurioza. Kiam la blanka nubaro kviete ŝvebas sur la serena ĉielo kaj la suno brilas, starante kun dorso al la suno sur la roko Sheshen je la 2-a ĝis 4-a horo posttagmeze kaj rigardante orienten, oni ofte povas vidi sian silueton en la

nubaro ĉirkaŭatan de ĉielarka lumo. Tiu mirinda bela spektaklo estas reflektita fenomeno de la suno, blanka nubaro kaj homo produktita en difinita loko.

La alta Emei-monto estas ideala loko por meteologia observado. Post la Liberiĝo la ŝtato starigis meteologian stacion sur la Ora Pinto. Ĝiaj meteaj materialoj estas liverataj al la meteologia centralo en la provinca ĉefurbo Chengdu.

Mal-supren irante de la Ora Pinto laŭ la dekstra montvojo, oni povas survoje rigardi pejzaĝojn. Piedirinte ĉ. 15 km., ni venis al templo kun nomo Xixiangchi (baseno por lavi elefanton). Maldekstre de la templo sin trovas ŝton-masonita ses-angula baseno kun profundeco de pli ol 3 metroj. Legendo diras, ke en antikveco ĉiufoje kiam bodisatvo Samantabhadra — la unua disĉiplo de la fondinto de la budhismo Sakja-Muni preterpasis tiun lokon, li lavis sian elefanton en la baseno. Pro tio ĝi ricevis la nomon. Post la Liberiĝo oni tie konstruis domon kun koridoro. En nokto, kiam malaperis nuboj kaj nebulo kaj brilas la luno, turistoj povas ĝui ĝian faman pejzaĝon — la luno en la baseno.

La templo Xixiangchi situas en la loko alta je 2,200 metroj super la mara nivelo, kaj la loko estas limdivida linio por la pejzaĝoj de Emei-monto. Supre de ĝi la pejzaĝoj estas majestaj kaj la tri plej altaj pintoj kvazaŭ starus en la ĉielo. Malsupre de ĝi estas elegantaj montoj, verdaj arboj, klaraj riveretoj kaj kvietaj valoj, kiuj formis belajn bildojn.

Preteririnte Xixiangchi, ni venis al la templo Xianfeng, konstruita en la meza periodo de la 18-a jarcento. Antaŭ ĝi staras antikvaj grandaj arboj kaj post ĝi altaj rokoj pikas rekte nubojn, kontraŭ ĝi staras montpinto kiel verda ekranego. Sub roko for de la templo je 1 kilometro en ĝia dekstra flanko sin trovas granda kaverno. Legendo diras, ke en antikveco 9 maljunuloj ripozis en la kaverno kiam ili preterpasis ĝin. Pro tio ĝi portas la nomon "Jiulaodong" (Kaverno de 9 Maljunuloj).

Plu malsupren, ni preteriris la someruman lokon Hongchunping, kaj laŭ vala rivereto venis al ravino kie troviĝas ŝtalponta vojo kun balustrado sur rokmuro alta je 100-200 metroj. Ĝi kaj la najbara

pavilono Qingyinge estas la plej belaj lokoj el la pejzaĝoj de Emei-monto. Kiam ni malrapide iras sur ĝi antaŭen, ni vidis lianojn multe kreskantajn sur rokmuroj, tra la mallargha ravino alpenetris la suna lumo kaj sub la vojo klara akvo kuras rekte al la ravina buŝo. Elirinte la ravinon, ni vidis ke akvofalo flugas malsupren kun bruego, estigante blankajn ŝaŭmojn kaj la torenta akvo kuras rekte al Qingyinge.

Qingyinge konstruiĝis en la kvara jarcento kaj estas ĉirkaŭata de verdaj montoj ambaŭflanke. La torentoj el la ravinoj ambaŭflanke de Qingyinge klare surportas respektive blankan kaj nigran kolorojn pro la suna prilumado kaj ombrado. La du fluoj kuniĝas ĉe insula fino kaj frapegas malmolan kaj glatan ŝtonegon starantan en la fluomezo kun formo de bova korpo, kio estigas surdigan bruegon, blankan ŝaŭmon kaj nebulon, sur kiuj montriĝas koloraj ĉielarkoj sub la sunradio. Ĉio ĉi tio donas al turistoj grandan plezuron.

Forlasinte Qingyinge kaj transirinte montpinton, ni venis al la impona kaj majesta templo Wannian


(alinome Samantabhadra). Ĝi konstruiĝis en la 4-a jarcento kaj la Brika Halo en ĝi konstruiĝis en la 16-a jarcento. La kvadrata halo estas sen lignaj traboj. Ĝiaj tegmentrandoj, porda kadro kaj volbo estas ornamitaj per belkoloraj desegnoj. En la mezo de la halo staras bronza statuo de la bodisatvo Samantabhadra rajdanta sur elefanto, alta je 9.1 metroj kaj peza je ĉ. 62 tunoj. Ĝi estas unu el la gravaj historiaj objektoj protektataj de la ŝtato. La viveca statuo kun bela formo estas rara artaĵo farita en 980 p. K. kaj prezentas eminentan artan nivelon de la antikva laboranta popolo.

Emei-monto dotiĝas ne nur per belaj pejzaĝoj, sed ankaŭ per diversaj specoj de vivaĵoj. Laŭ enketado, tie estas pli ol 2,000 specoj de animaloj kaj pli ol 3,000 specoj de plantoj. Surmonte oni povas vidi ĉielskrapantajn nanmuojn, abiojn, petolemajn simiojn, rokajn kolombojn manĝaj-serĉantajn, ktp. La animaloj kaj plantoj de Emei-monto estas protektataj de la ŝtato, kaj koncernaj sciencaj kaj esploraj institucioj ofte sendas esplorantojn al la loko por fari enketadon.

Abioj sur monto 3,000 metrojn alta



Sur la Ora Pinto super nuba maro



Vizito al la Regiono de Ĝuangoj

de LAOBAl

EN 1978 okazis la 20-a datreveno de la fondiĝo de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, kaj en decembro mi veturis de Beijing al tiu loko por kolekti informojn. En norda Ĉinio tiam estis froste kun neĝo kaj glacioj, dum en Guangxi la montoj portis verdajojn kaj la bluaj riveroj torentis. Mi vizitis urbojn kaj montvilaĝojn kaj vidis tieajn popolanojn en gaja vivo kaj vigla laborado.

HEJMLOKO DE HEROJ

Iutage, mi veturis per aŭto al la montregiono en norda Guangxi. Oni diras, ke 70 procentoj de Guangxi estas montoj, 20 procentoj estas akvoj kaj nur 10 procentoj estas kampoj. Vere tiel estas. Tamen ĝiaj montoj estas diferencaj de la ordinaraĵoj, ili apartenas al karsto. Geologoj konstatis, ke antaŭ tricent milionoj da jaroj tie estis vasta maro, ĉe kies fundo formiĝis sedimentaj rokoj konsistantaj ĉefe el kalcia karbonato. Sismo de la terkrusto dum multaj multaj jaroj kreis montojn el la roka stratumo kaj eroziado formis mirindajn kavernojn en tiaj montoj. En la regiono Guangxi preskaŭ ĉiu monto enhavas kaverton kaj ĉiu kaverno estas mirinda. La sennombraj altaj montoj nuboskrapantaj similas al gigantaj brokatoj faritaj de ĝuangaj knabinoj kaj pendantaj de la ĉielo. Ŝtupaj kampoj estas konstruitaj de rivervalo supren ĝis montpintoj. La

nove plantitaj ole-kamelioj, tung-arboj kaj bananarboj bele ornamas la monton.

Iu ĝuanga maljunulino kunveturanta en la aŭto pririgardis min kaj demandis: “Ĉu vi estas alilokano?”

“Jes, Beijing-ano (pekinano).”

“Bone rigardu. La monta ŝoseo kaj la ŝtupaj kampoj estas nove konstruitaj, la fruktaroj sur la montoj estas nove plantitaj. Cirkulas popola diro: Grenkampoj 3-jare, tung-arboj 5-jare, 8-jaraj ole-kamelioj fruktas tutmonde. Se vi revenos al ni post 8 jaroj, tiam vi trovos la montojn plenaj de fruktaroj.”

La onklino estis serena kaj vigla anima. Mi scias, ke en tiu regiono vivas nemalmultaj revoluciaj veteranoj kaj demandis ŝin: “En kiu vilaĝo vi loĝas?” Iu apude sidanta knabino diris al mi, ke ŝi, nomata Wei Wuding, estas juna fratino de martiro Wei Baqun. Oh jes, antaŭ kelkaj tagoj mi vidis ŝian nomon en ĵurnalo. Ŝi antaŭe revoluciadis kune kun sia frato kaj mem estis heroino. Ŝi jam havas la aĝon de pli ol 70 jaroj, tamen ĝiaj oreloj kaj okuloj bone funkcias, ŝia parolo estis tre klara kaj ŝi serene ridegis de tempo al tempo dum gaja interparolo.

La aŭto kuris tra valo laŭ la bordo de la rivero Hongshui. Tiu

rivero estas ne tre longa kaj ĝia parto en Guangxi longas 634 kilometrojn.

En la supra baseno de tiu rivero sin trovas Donglan-gubernio, kaj ne fore de ĝia gubernia urbo estis la montvilaĝo Wuzhuan, kie koncentre loĝas ĝuangoj. En 1922, ĉe la bordo de tiu rivero ĝuanga junulo Wei Baqun levis batalan ŝtormon kontraŭ la kruela ekspluatado de bienuloj kaj venĝis la malriĉajn popolanojn. En 1925, Wei Baqun akceptis la gvidadon de la Komunista Partio kaj disvolvis batalon kontraŭ Kuomintango. En 1929, la Partio sendis Deng Xiaoping (Deng Hiaoping) kaj aliajn al Wei Baqun por helpi lin en laboro. Ili kune faris la Insurekcion de Baise ĉe Baise kaj Longzhou de Guangxi, fondis la 7-an Korpuson de la Ĉina Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo kaj revolucian bazon antaŭ duona jarcento.

La onklino diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo la trafiko en la montregiono estis tre malfacila kaj por viziti la montvilaĝojn oni devis piediri trans montojn. Nun en la aŭtonoma regiono funkcias multaj aŭtovojoj kaj ĉiu komunumo estas atingebla per aŭtobuso. Ŝi jetis rigardon eksteren kaj diris, ke fronte de ni ĉe la monttalo kuŝas fame konata danĝera parto de la ŝoseo. Ĝi estis konstruita sub la gvido de Maljuna Meng.

Maljuna Meng, kiu akompanis nin, estas ĝuang-o kaj vicsekretario de la partia komitato de Donglangubernio. Li apenaŭ lernis kelkajn jarojn en lernejo kaj estas tre lerta kantisto. Ekaŭdinte la parolon de la onklino pri la konstruado de la ŝoseo, li ekkantis mallaŭte:

*Sur kruta mont', en mur' de roko
por tigr' netrairebla loko —
bruas marteloj, min-eksplodoj;
kreiĝas glata aŭtovojo.*


La ĝuangoj kutimas sin amuzi per popolkantoj, kaj dum mia vizitado mi ofte estis ĉarmita de belaj kantoj. Tre admirinda estas la saĝeco de la ĝuangaj popolanoj. Ili eklernas popolkantojn en sia infanaĝo kaj povas improvizi kantojn pri objektoj, pejzaĝoj kaj sentoj.

Post la Liberiĝo, oni konstruis aŭtovojon de Donglangis Wuzhuan kun longeco de 55 kilometroj. Por traveturi tiun vojon, aŭto devas transpasi kvar montegojn, tio bezonas pli ol 4 horojn. Por faciligi la trafikadon komunumanoj konstruis, antaŭ unu jaro, novan vojon 37-kilometran sub la gvido de Maljuna Meng. Tiu vojo transpasas sur unu monton kaj estas traveturebla en iom pli ol unu horo. Dum la konstruado, Maljuna Meng tage laboradis kaj nokte interbabilis aŭ kantadis kune kun la komunumanoj, kaj la popolanoj intime nomis lin Pajlsandala Sekretario pro tio, ke li portis tian piedveston anstataŭ ŝuojn.

Nia aŭto haltis en la sidejo de la popola komunumo Wuzhuan. Ĉe la vilaĝfino troviĝis kvaretaĝa sesangula turo nomata Kuixing-turo. Kuixing estas dio de literaturo en ĉina mito. Por prosperigi sian literaturan aferon, la bienuloj kaj potenculoj de tiu loko konstruigis tiun turon en 1906. En 1930, la Fronta Komisiono de la 7-a Korpuso de la



Al elementa lernejo



Novaj loĝdomoj de ĝuangoj

*Revolucia avino Vei Wuding
(meze) inter siaj amikinoj*



Ruĝa Armeo prenis ĝin kiel sian sidejon, kaj Vicĉefministro Deng Xiaoping, kiu tiam estis politika komisaro de la 7-a Korpuso, laboris kune kun Wei Baqun kaj aliaj gvidantoj en tiu turo kaj direktis la revolucion sur la bordoj de Hongshui-rivero kaj okcidenta Guangxi.

LERNEJO DE MONTVILAĜO

La vesperoj en montaro estas belaj. La lumo de la luno kaj tiu de la lampoj miksiĝas kaj sin ĵetas al la kampoj ĉirkaŭ la vilaĝo kaj al la kortoj de la loĝantoj. En la aero ŝvebas belaj popolkantoj.

Ho, dolĉo de mielo!

*Antaŭe niaj kantoj 'stis amaraj
kaj je ekkanto falis larmoj,
sed nunaj kantoj estas ĝojaj,
la montoj plenas je kantĉarmoj.*


*Unue pro l' feliĉaj novoj,
due pro l' naciec-solidaro,
kaj trie pro l' komunumigo —
regas printemp' en la montaro.*

Mi iris en la direkto de la kantantoj. Ankaŭ multaj geknaboj kuris en la sama direkto. Baldaŭ ni alvenis al la pordego de iu mezlernejo. La kantado ĉesis kaj la geknaboj iris en siajn klasĉambrojn por vespera memlernado. Mi eniris sen-elekte iun klasĉambron. La lernantoj ripetis absorbite siajn lecionojn en lamplumo kaj iuj el ili mal-laŭte diskutis pri problemoj. Iuj el ili rimarkis min, tamen ne ĝeniĝis pro entrudiĝo de fremdulo. Ili ĝentile balancis sian kapon kaj ridetis al mi. Mi tute ne atendis, ke en klasĉambro de montara lernejo regas tia disciplinemo. Mi pririgardis 8 el la klasĉambroj kaj trovis ilin tute samaj. La instruistoj ne estis tie, ili kuns'dis por diskutadi pri instruado. Se iu el la lernantoj havas demandojn, li povas iri al instruistoj por konsulto. En tiu lernejo estas 8 lernogrupoj de su-

pera mezlerneja grado kun 420 lernantoj, kiuj partoprenos eniran ekzamenon de altaj lernejoj en julio. Mi demandis iun lernantinon, ĉu la lernado estas streĉa. Ŝi diris al mi, ke ĉiutage ili havas 6 lecionhorojn, 1 memlernan horon en la mateno kaj 2 memlernajn horojn en la vespero; do relative streĉa estas la lernado. Ŝi tamen aldonis, ke la efektivigo de la kvar modernigoj de la lando ja bezonas tion, do nature necesas lernado iom streĉa. Mi prenis je oportuneco notlibron de iu knabo nomata Huang Yu. Sur la kovrilo de la kajero troviĝas jenaj vortoj zorge skribitaj: "Marŝo al sciencoj". Li estas 15-jara, lia patro estas instruisto de elementa lernejo de tiu ĉi komunumo kaj lia patrino okupiĝas pri terkulturado. Liaj 3 pli aĝaj gefratoj studas en altaj lernejoj. Li mem ŝatas kemion kaj volas daŭrigi sian studadon pri tio en alta lernejo. Mi demandis lin, ĉu li estas certa, ke li sukcese trapasos eniran ekzamenon de alta lernejo. Li pripensis kaj diris, ke ne vanos diligentaj klopodoj de la strebantoj.

En Wuzhuan-komunumo sin trovas ankaŭ aliaj familioj similaj al tiu de Huang Yu, kiu havas plurajn studentojn. En tiu komunumo funkcias 128 elementaj lernejoj, 24 malsuperaj mezlernejoj kaj 1 supera mezlernejo. Antaŭ la Liberiĝo, la ĝuanga regiono estis tre postiginta en kulturo, kaj tie sin trovis multego da analfabetoj. Antaŭe en la vilaĝo Wuzhuan ne troviĝis mezlernejo kaj estis nur du studentoj. Nun ĉiu vilaĝo de la aŭtonoma regiono jam havas elementan lernejon, ĉiu brigado havas malsuperan mezlernejon kaj ĉiu komunumo havas superan mezlernejon. En relative gravaj urboj funkcias ankaŭ altaj lernejoj kaj teknikaj mezlernejoj. En la ĉefurbo de la regiono Nanning funkcias nacia instituto, kiu kulturadas kadrojn de nacimalplimultoj. La popolanoj de la nacimalplimultoj ŝatas uzi sian propran lingvon, tamen dank' al longa kontaktado kun hanoj, multaj ĝuangoj scipovas paroli ankaŭ la hanan lingvon. La ĝuanga lingvo estas tre bela kaj sonas kvazaŭ muzikajo. En la pasinteco, la ĝuangoj ne havis skriban lingvon. En 1956, la popola

La administrejo de la popola komunumo Wuchuan



registaro kreis, laŭ peto de ili, ĝuangan alfabeton latinliteran por skribi tiun lingvon.

UNU FAMILIO

En la unua tago de 1979, kelkaj gemaljunuloj invitis min pasigi la novjaran tagon kune kun iliaj familianoj.

Ĝuanga onklo Mo Dequan diris, ke mi iru al lia hejmo, ĉar lia plej aĝa filo kaj lia dua filino revenis de la urbo kaj li havas viglan festan rondon. Jaŭ-nacieca onklo Huang Zhengxiang diris, ke mi iru al li por gustumi lian ĵus preparitan rizarakon. Sed la sprita ĝuang-nacieca onklino Wei diris, ke la edzino de ŝia nepo naskis fileton antaŭ 3 monatoj, kaj ĉi-matene pigo grakadis sur arbo por anonci, ke gasto veninta de malproksime certe trafos ŝian hejmon. Al kies domo do mi iru? Ili rimarkis mian embarason kaj decidis, post interkonsiliĝo, ke mi iru al la domo de onklino Wei kaj ankaŭ onkloj Mo kaj Huang iros kune kun ni.

Onklino Wei estas 69-jara. Ŝia edzo estis murdita de malamiko antaŭ 40 jaroj, ŝiaj filo kaj bofilino terkulturas en la produkta taĉmento de tiu vilaĝo. Ŝia nepo estas traktoristo kaj edziĝis al knabino de najbara vilaĝo en la antaŭlasta jaro. La tuta familio vivis harmonie kaj feliĉe. Onklino Wei kondukis min en la gastoĉambron kaj montrante sian triĉambran nordan domon, ŝi diris al mi, ke antaŭe la ĝuangoj ne loĝis en tia domo, sed en ligna du-

etaĝa domo. La homoj loĝis supre kaj la brutoj malsupre. La planko de la supra etaĝo estis farita el bambuoj kaj la fiodoro povis facile penetri supren malutile al la loĝantoj. Sed pro tio, ke tiam en la montaro estis multaj rabistoj kaj sovaĝbestoj, oni devis sin protekti de ili per tia loĝejo. Nun jam tute aliĝis la situacio, la brutoj estas tenataj en apartaj staloj, ne nur neniuj rabistoj plu ekzistas, eĉ se knabo trovas, ke karmo saltis el fiŝbreda laĝeto, li ĝintuj rejetas en la bredejon.

Onkloj Mo kaj Huang alvenis kun vinkruĉoj kaj ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ ronda tablo kun alteco de 30 centimetroj. En la mezo de la tablo estis ronda truo kun diametro de 15 centimetroj, sub kiu estis forno kies flamo povis penetri supren tra la truo. Sur la fajro estis sabla poto en kiu bolis supo. Sur la tablo kuŝis pladoj kun maldikaj viandpecoj kaj legomoj pretigitaj por kuro. La ĉirkaŭsidantoj povis laŭplaĉe meti ilin en la supon kaj manĝi post mallonga kuro. Tio estas ŝatata maniero por la montanoj en preparo de manĝaĵo. Krome, sur la tablo troviĝis ankaŭ alia ŝatata manĝaĵo de la ĝuangoj, nome acidaj legomoj kiel melonoj, rafanoj, brasiko kaj manioko. Tia legomo estas iom dolĉe acida kaj akra-gusta, posedata de ĉiu familio kaj ŝatata de ĉiuj.

Informiĝinte ke mi estas manĉuro, onklo Huang levis sian pokalon kaj diris, ke ni membroj de trinacimalplimulto trinku pro la nacia

solidareco! La rizarako estis malforta sed aroma kaj bongusta.

Dum la manĝado, mi demandis pri la juna mastro. Onklino Wei diris, ke ni ne zorgu pri ŝia nepo, ĉar li iris al la domo de sia edzino. Mi informiĝis, ke ĝuangoj loĝantaj en la montaro ankoraŭ konservas sian tradician kutimon, ke edziniĝinta virino ne loĝadas en la domo de sia edzo. Post geedziĝo, la nov-edzino loĝas nur tri tagojn en la hejmo de sia edzo, kaj poste ŝi estas resendita al la domo de siaj gepatroj. Okaze de Novjaro kaj aliaj festoj, aŭ la edzo iras al la domo de la edzino aŭ li revenigas la edzinon al sia domo por kelktaga loĝado, kaj poste la edzino revenas al sia gepatra hejmo, kaj tie loĝadas ĝis nasko de la unua infano, kaj nur poste ŝi transloĝiĝas al la domo de sia edzo. La ĝuangaj gejunuloj laborantaj en la urboj kaj minejoj antaŭ longe jam ŝanĝis tiun kutimon.

Dum nia interparolo, subite malfermiĝis la pordo kaj enpaŝis para da gejunuloj. La virino portis infanon en siaj brakoj. Onklino Wei tiel ĝojis pro ilia alveno, ke ŝia buŝo ne povis fermiĝi pro rido. Ŝi transprenis la pranepon murmurante: "Mi sciis, ke vi venos, ĉar frumatene pigo sur arbo jam informis min pri tio!" Ĉiuj ekridis pro ŝia rimarkigo.

Je tiu momento, grupo da kantantaj knabinoj svarme envenis por vidi la junulinon ĵus alvenintan por fiksloĝado . . .



Ŝtona Kaverno de Longmen

de DONG DAZHONG

LONGMEN sin trovas je ĉirkaŭ 12 kilometroj sude de Luoyang de Henan-provinco. La loko trafluas Yishuj-rivero de sudo al nordo. Sur ambaŭ bordoj de tiu rivero staras du ŝtonaj montoj, unu kontraŭ la alia, kiuj formis naturan pordon, kaj ĝuste pro tio la loko ricevis la nomon Longmen, kiu signifas drakan pordon en la ĉina lingvo.

Longmen estas unu el la famaj vizitindejoj de Luoyang-regiono. Tie ĉarmas pejzaĝoj. La fame konata ŝtona kaverno de Longmen dislokiĝas en rokmuroj de tiuj du montoj. De mil jaroj ĝi allogas al


si multajn turistojn kaj multaj famaj poetoj verkis belajn versaĵojn pri ĝi.

La nomita ŝtona kaverno estis ekfarita en la fino de la kvina jarcento p.K., kiam Norda Wei-dinastio translokis sian ĉefurbon al Luoyang. Ĉar Norda Wei-dinastio kredis je kaj pledis por budhismo, tial tre prosperis en ĝi budhisma arto. Frue en la regperiodo de imperiestro Wencheng (452-465 p.K.) senombraj laboruloj estis senditaj al la monto Wuzhou je 7.5 kilometroj for de la ĉefurbo Datong en ĝia nordokcidento, por fari grandan ŝtonan kavernaron de Yungang. En

la 18-a jaro de la regperiodo de imperiestro Xiaowen (494 p.K.) Norda Wei-dinastio translokis sian ĉefurbon de Datong al Luoyang kaj komencis ĉizigi statuojn de budho en rokmuroj de ambaŭ bordoj de Yishuj-rivero. Poste, dank' al plua konstruado en Orienta kaj Okcidenta Wei-dinastioj (533-550 p.K.), Norda Zhou-dinastio (557-580 p.K.), Norda Qi-dinastio (556-577 p.K.), Sui-dinastio (589-618 p.K.) kaj Tang-dinastio (618-907 p.K.), la du montoj sur la bordoj fariĝis fame konata arta trezorejo de nia lando. Laŭ historiaj libroj, en pli ol 400 jaroj de Norda Wei-dinastio

La meza kaverno Binyang

La ĉefa statuo en la meza kaverno Binyang




ĝis la komenco de Song-dinastio, sur la montoj skulptiĝis sume 97,306 statuoj kaj en 3,680 ŝtonpecoj ĉiziĝis surskribaĵoj. Laŭ la lastatempa statistiko de la Administracio de Kulturaj Objektoj de Longmen, nun konserviĝas en la montoj 1,352 kavernoj, 750 malgrandaj niĉoj kaj 39 pagodoj. La kaverno de Longmen estas komparebla kun tiu de Yungang tiel en skalo kiel en varieco de skulptado.

La talentaj antikvaj skulptistoj ĉerpis kaj akumulis riĉan sperton de verkado kaj atingis admirindan sukceson en la arto. Ja estis mirinde, ke oni sukcesis skulpti statuojn altajn je pli ol dek metroj sur krutaj rokmuĝoj per simplaj instrumentoj kiel martelo kaj ĉizilo. Pli grave estis, ke la statuoj havas ver-similajn trajtojn de ĝojo, afableco, braveco, majesteco de budho kaj pieco kaj kvieteco de kultanto. Ĉio

ĉi tio montris artan resumon al sentoj de realaj homoj. Krome ankaŭ la domoj, flagoj, vestoj kaj skarpoj estis skulptitaj laŭ realaj objektoj. Tial la artaj verkoj de la ŝtona kaverno de Longmen, kvankam enhave temas pri budhismo, tamen entenas certan popolecon kaj realismon kaj montras la saĝon kaj artan talenton de la ĉina popolo.

Plafona ornamajo de la kaverno Lotusfloro



Budho-statuo





LA BEIJING-A BRAJLA ELDONEJO

Lastatempe fondiĝis la Beijing-a Brajla Eldonejo. Ĝia ĉefa tasko estas eldoni popularajn legaĵojn bezonatajn de blinduloj en lernado de politiko, scienco kaj kulturo.

Brajlo en nia lando havas historion de pli ol 100 jaroj, sed en la pasinteco ĝi ne estis unuigita kaj normigita. En la jaro 1953 naskiĝis la nuna unueca brajlo de nia lando.

ĈINA VERSIO DE LA MEKSIKIA VERKO "QUETZALCCATL"

La nomita verko de meksikia prezidento Jose Lopez-Portillo estas tradukita en la ĉinan lingvon kaj eldonita de la Popola Literatura Eldonejo de nia lando. La verko estas bone akceptita de la ĉinaj legantoj. Per viveca prezento de la mito pri Quetzalcoatl, ĝi esprimis la intensan postulon de la meksikia popolo pri disvolvo de produktado, defendo de la suvereneco kaj opono kontraŭ atenco de eksterlando.

HISPANA VERSIO DE "KOMPENDIO PRI ĈINA AKUPUNKTURO" EN KOLOMBIO

Tiu libro de la unua eldono estas vendata en Bogoto, la ĉefurbo de Kolombio, kaj varme akceptata de la medicinaj rondoj de tiu lando.

La libro estas redaktita de la Ĉina Ĉin-medicina Instituto kaj tradukita de kolombia kuracisto el la angla lingvo.

MONUMENTO DE LA NANCHANG-A INSUREKCIO JE LA UNUA DE AŬGUSTO

La nomita monumento estas konstruita en Nanchang, Jiangxi-provinco. Je la unua de aŭgusto, 1927, okazis la Nanchang-a Insurrekcio sub la gvido de kamaradoj Zhou Enlai (Ĝou Enlai), Zhu De (Ĝu De), Chen Yi (Ĉen Ji) kaj aliaj. Poste la unua de aŭgusto estis difinita kiel la naskiĝtago de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.


La monumento kun alteco de 45.5 metroj staras ĉe la suda fino de la placo "La Unua de Aŭgusto" en la centro de la urbo Nanchang. Ideografiaĵoj signifantaj "Monumento de la Nanchang-a Insurrekcio je la Unua de Aŭgusto", skribitaj de Prezidanto Hua Guofeng, estas inkrustitaj sur la monumento. Sur la fronto de la monumenta soklo gravuriĝis vortoj pri la insurekcio, kaj sur la aliaj tri flankoj troviĝas reliefoj pri la insurekcio. Supre de la monumento staras fusilo 14 metrojn alta kaj arma flago 8.5 metrojn alta kaj 8.1 metrojn larĝa el granito.



JAPANA ARTA TRUPO DE KABUKO EN ĈINIO

En januaro ĉijare, la Japana Registaro sendis artan trupon de kabuko al Ĉinio. Ĝi faris prezentadon en la urboj Beijing, Hangzhou (Hangĝou) kaj Shanghai (Ŝanhajo).

La japana arto de kabuko havas historion de pli ol 300 jaroj. Ĝi reprezentas japanan tradician klasikan arton. En aŭtuno de 1955, japanaj kabukaj aktoroj faris viziton al Ĉinio. La ĉifoje veninta trupo konsistis el 84 personoj, inter kiuj sin trovis ne nur maljunaj aktoroj titolitaj kiel "ŝtataj trezoroj" sed ankaŭ junaj steloj. Ilia brila prezentado ricevis laŭdojn de la ĉinaj spektatoroj.






Konstanta Amikeca



Ĉina Tablotenisista Delegacio vizitis Usonon en 1972 kaj estis varme akceptata.



Ĉina Sciencista Delegacio vizitas la Landan Laboratorion de Brook Haven en Usono.




La Ĉina Spacteknologia Delegacio vizitis Usonon en 1978.

Aktoreto de la Akrobata Trupo de Shenyang ĝoje manpremas kun usona amiketo.




FIŜBREDA KURSO EN ĈINIO POR UNO


Ĉinio funkciigas kursojn pri fiŝbredado en dolĉa akvo por Disvolva Programo kaj Manĝaja kaj Agrikultura Organizo de UNO. Nun en la Dolĉakva Bredejo de Guangzhou (Kantono) iras la tria tia kurso, en kiu lernas fiŝbredistoj de Sri-lanko kaj Bengaldeŝo.



Kursanoj lernas injekti al ina fiŝo.



Prof. Zhong Lin helpas studentojnen lernado.



Cina iŝtiologo Prof. Zhong Lin prelegas pri kreskado de bredataj fiŝoj.



Leciono donata al la kursanoj ĉe baseno por elovigado



**FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ**

Papilio sur eŭpatorio
(*Eupatorium chinensis*)
Foto de japano
Kaĉi Teruhiko



Lilio
oto de belgo
J. Meijer




Arto de la Kavernoj de Longmen

Fengxian-templo
en malproksimo



Niĉoj en Guyang-kaverno



Giganta budho en Fengxian-templo

Ciela generalo kaj fortulo en Fengxian-templo



Dekmil-bud-
ha Kaverno



Muzikistino



Fluganta anĝelo



